899

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

ESPERANTISTA DOKUMENTARO

PRI LA OFICIALAJ, HISTORIAJ, BIBLIOGRAFIAJ KAJ STATISTIKAJ AFEROJ

Kajero dek-sesa
(*Decembro* 1910)

I.

OFICIALA PARTO

SEKCIO A : KONGRESOJ

7.

SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Washington, 14-20 Aŭgusto 1910)

Prezo : 1 fr.

PARIS,
ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO
51, RUE DE CLICHY, 51

1910

Sartorio
va
BIBLIOTECA
Mod. B 17.1/2

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

51, rue de Clichy, Paris

KATALOGO DE LA ELDONAJOJ

Ĉiu persono, kiu deziras ricevi akurate ĉiujn eldonajojn de la Centra Oficejo, aŭ nur specialan serion, tuj post ilia apero, nur bezonas por tio, sendi ian monsumon al la Centra Oficejo, kaj oni malfermos konton je ĝia nomo.

ESPERANTISTA DOKUMENTARO

I. — Oficiala Parto.

Sekcio A. *Kongresoj*. Oficialaj Raportoj.

	Frankoj
Unua Kongreso universala de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 1905).	0 50
Dua Kongreso universala de Esperanto (Genève, 1906).	1 50
Tria Kongreso universala de Esperanto (Cambridge, 1907). . .	1 50
Kvara Kongreso universala de Esperanto (Dresden, 1908).	2 »
Kvina Kongreso universala de Esperanto (Barcelona, 1909)	2 »
Sesa Kongreso universala de Esperanto (Washington, 1910). . .	1 »
Fundamentaj dokumentoj pri la Konstanta Komitato de la Kongresoj	0 25

Sekcio B. *Lingva Komitato*.

1. Vortoj elĉerpitaj el Hamleto kaj ne troveblaj en Universala Vortaro.	0 10
2. Pri la plenigo de la Universala Vortaro	0 10
3. Pri participa sufikso antaŭ verba finiĝo	0 25
4. Zamenhofaj Vortoj	1 »
5. Fundamentaj dokumentoj pri la Lingva Komitato	0 25
6. Unua Oficiala Aldono al la Universala Vortaro	0 50
7. Pri la transskribo de la Propraj Nomoj	1 »

Sekcio C. *Oficiala Gazeto*.

1. Fundamentaj dokumentoj pri la Oficiala Gazeto kaj la Centra Oficejo..	0 25

II. — Historia parto.

III. — Bibliografio de Esperanto.

IV. — Statistika parto.

Esperantista Societaro.

1ª eldono, 30 junio 1906.	1 50
2ª eldono .31 decembro 1906	1 50
3ª eldono, 30 junio 1907	1 50
4ª eldono, 31 decembro 1907	1 50

(*Vidu sekvon sur la paĝo tria de la kovrilo*).

Donacio de:
Giancarlo SARTORIO

SESA UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

ESPERANTISTA DOKUMENTARO

PRI LA OFICIALAJ, HISTORIAJ, BIBLIOGRAFIAJ KAJ STATISTIKAJ AFEROJ

Kajero dek-sesa
(*Decembro* 1910)

I.

OFICIALA PARTO

SEKCIO A : KONGRESOJ

7.

SESA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Washington, 14-20 Aŭgusto 1910)

Prezo : 1 fr.

PARIS,
ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO
51, RUE DE CLICHY, 51

1910

C. O. 203

BIBLIOTECA FISCE/
SARTORIO GENOVA
ESPERANTO

SESA UNIVERSALA

KONGRESO DE ESPERANTO.

(Washington. 14-20 Aŭgusto 1910).

I. — MALFERMA PAROLO DE D-RO. L. L. ZAMENHOF.

Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidama turismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo, ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksdevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkiĝu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado, pli aŭ malpli fruc la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldaŭ eĥe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, esperantistoj, ne estas homoj riĉaj; de nia nuna kongreso ni sekve ne povas atendi gravajn decidojn, kiuj havus signifon por la tuta esperantistaro. Ni venis al vi, Usonanoj, precipe por pasigi en via mezo kaj antaŭ viaj okuloj unu semajnon de nia esperantista vivo, por montri al vi almenaŭ malgrandan pecon de tiu vivo, por alporti al vi semon; kaj ni esperas, ke post nia foriro tiu semo potence ĝermos kaj kreskos, kaj en via lando nia afero baldaŭ havos siajn plej fervorajn kaj plej gravajn apostolojn.

*
* *

En via lando, Usonaj samideanoj, nia afero estas ankoraŭ tro juna, kaj multaj el vi ne ellaboris al si ankoraŭ tute klaran juĝon pri ĝi; tial permesu, ke mi almenaŭ *iom* esploru antaŭ vi la vojon, kiun ni iras.

Kion celas la esperantista movado? Ĝi celas atingi reciprokan kemprenadon inter ĉiuj homoj kaj popoloj. Por kio ni bezonas tian reciprokan komprenadon? Kiaj estas la sekvoj, kiujn ni atendas de ĝi? Kial ni deziras, ke ĝi estu nepre sur fundamento neŭtrala? Kial ni tiel persiste laboras por ĝi? Kia estas la spirito, kiu nin ĉiujn ligas inter ni? Pri ĉio ĉi tio mi jam multe parolis, kaj mi ne volas nun ripeti miajn vortojn, des pli, ke ĉiu el vi post kelka meditado facile mem trovos la respondojn. Antaŭ vi, praktikaj Amerikanoj, mi volas analizi alian demandon, nome : ĉu ni kun nia laborado staras sur vojo tute *certa*, aŭ ĉu ni povas timi, ke iam nia tuta laborado montriĝos vana? Nur plena konscio pri la irota vojo donas al la marŝantoj sufiĉe da energio, por kontraŭbatali ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj troviĝas sur la vojo.

La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj; aŭ per laborado de homoj privataj, t. e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Kia devas esti la karaktero de la unua vojo, pri tio neniu povas dubi; pri afero, kies tuta esenco kaj vivo estas bazita sur interkonsento, ĉiu komprenas tre bone, ke laborado de amasoj povas ĝin konduki al celo nur tiam, se ĉiuj laboras unuanime. En tia afero, se ĝi per si mem montriĝis vivipova, konkordo estas la plej certa garantio de senduba sukceso, malkonkordo signifas la morton. Tion komprenas tre bone niaj samideanoj, kaj tial ili kun indigno forpuŝas ĉiun, kiu

volas delogi ilin de la komuna vojo. Sed iufoje en la kapo de tiu aŭ alia samideano aperas la sekvanta demando; kio estos la sekvo, se la solvon de la internacilingva problemo volos iam preni sur sin ia granda *forto*, kontraŭ kiu ni ĉiuj estas tro senfortaj, ekzemple la registaroj de la mondo? Ĉu ni devas timi, ke ili eble elektos alian solvon, ol ni elektis, kaj tiamaniere nia tuta laborado fariĝos vana?

Por trovi klaran respondon al tiu demando, ni prezentu al ni, ke la registaroj de la mondo aŭ iaj aliaj grandaj kaj influaj potencoj starigis aŭtoritatan komitaton, kiu devas decidi, kia lingvo devas fariĝis internacia. En la artikolo « Esenco kaj Estonteco » kiun multaj el vi legis en la « Fundamenta Krestomatio », mi analizis tiun demandon detale kaj mi montris tute klare tion, pri kio en la nuna tempo jam neniu esploranto dubas, nome, ke tia komitato, pri kio mi parolis, neniel povus elekti ian lingvon nacian, nek ian lingvon mortintan, nek ian lingvon kun plene elpensita vortaro, sed ĝi devus nepre elekti nur aŭ Esperanton en ĝia nuna formo, aŭ Esperanton iom ŝanĝitan. Se la komitato kontraŭ ĉiuj postuloj de la prudento, volus fari ian alian decidon, ĝia decido restus nur decido papera kaj praktike absolute senvalora. Nun ni regardu, kia estas la sola maniero, en kiu la komitato povus solvi la lastan alternativon.

Plej nature kaj plej kredeble estas, ke la komitatanoj rezonados simple en la sekvanta maniero : « Ekzistas lingvo artefarita, kiu montriĝis tute vivipova, bonege funkcias, bonege sin tenas jam multe de jaroj, kreis grandan literaturon, ellaboris sian spiriton kaj vivon, k. t. p.; sekve anstataŭ fari tute senbezone kaj sencele riskajn novajn eksperimentojn, ni simple akceptu tion, kio jam ekzistas, ni donu al ĝi la aŭtoritatan apogon de la registaroj, kiujn ni reprezentas, kaj tiam la tuta eterna problemo estos tuj plene solvita, kaj de morgaŭ la tuta civilizita homaro reciproke sin komprenos. »

Tia, mi ripetas, estas la plej natura decido, kiun ni povas atendi de la registare elektota komitato. Sed ni supozu, ke la komitato trovos, ke diversaj ŝanĝoj en Esperanto estas efektive tre *necesaj*. Kiel do ĝi agos?

Antaŭ ĉio ĝi sin demandos, ĉu ĝi estas sufiĉe *forta*, por altrudi sian teorian volon al tiuj multaj miloj da homoj, kiuj ĝis nun estis la solaj laborantoj en la afero. La esperantistoj laboris dum longa vico da jaroj, multe laboris, multe oferis kaj kun tre granda malfacileco fine akiris tion, kio dum multaj mil-jaroj ŝajnis neakirebla kaj kio, unu fojon perdita, neniam plu reakiriĝus, ĉar la mondo perdus la tutan konfidon al la internacilingva ideo. Sekve ĉiu prudenta komitato

dirus al si : ni devas esti tre singardaj, por ke, anstataŭ akceli la aferon, ni ĝin ne pereigu por ĉiam. Se la komitato scius, ke ĝin elektis ekzemple nur ia unu tre malgranda kaj malgrava landeto, ke la elekto estis nur tute senvalora formalaĵo, ke la elektintoj tute sin ne interesas pri la afero kaj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon ĝin subteni, nek la forton por tio, tiam prudentaj komitatanoj nur simple esprimus sian opinion kaj dezirojn pri diversaj farindaj ŝanĝoj en Esperanto kaj lasus la akceptadon aŭ neakceptadon al la decido de la esperantistoj mem, sed neniam komencus konkuradon kontraŭ la esperantistaro, ĉar ili komprenus, ke morale tio estus nur peko kontraŭ la internacilingva ideo kaj praktike ĝi pli aŭ malpli frue kondukus nur al fiasko.

Nun ni supozu, ke por la decido de la demando pri lingvo internacia estas kreita komitato, kiu havas forton ne *fikcian* sed *efektivan* kaj *grandan*. Antaŭe mi jam montris, ke se tia komitato ne volos, ke ĝia decido restu praktike absolute senvalora, ĝi povos preni nur aŭ Esperanton, aŭ ion tre similan al Esperanto. Mi diris jam, ke plej kredeble ĝi akceptos simple Esperanton en ĝia nuna formo. Sed ni supozu, ke ĝi tion ne volos fari; kiel do ĝi agos? Ĉar ĝi komprenos tre bone, ke por krei vivipovan lingvon tute ne sufiĉas esti instruita homo kaj diri al si « mi kreos »; ke oni ne povas tion fari laŭ mendo en la daŭro de kelke da semajnoj; ke tio postulas tre longan, fervoran, sindoneman, amoplenan laboradon, elprovadon, trasentadon, k. t. p.; kaj ĉar ĝi scios, ke ekzistas jam lingvo, super kiu multe da homoj tre longe laboris, kiu havas multejaran historion, kaj tutan vivon, ke tiu lingvo bonege funkcias, kaj nur malmultaj punktoj povas en ĝi esti disputeblaj : tial estas tute komprenebla, ke se la komitato traktos sian taskon serioze, ĝi ne riskos preni sur sin mem la kreadon de tute nova lingvo, nek prenos alian lingvan projekton, kiun la vivo ankoraŭ ne sufiĉe elprovis, ne komencos tute senbezone, sekve neprudente bataladon kontraŭ tiuj, kiuj ĝis nun laboris en la afero, sed ĝi prenos Esperanton kaj faros en ĝi tiujn ŝanĝojn, kiujn ĝi trovos necesaj.

Al kiu la komitato komisius la faradon de la ŝanĝoj? En la tempo *prepara*, kiam estus necese esplori principe la demandon, *kian* lingvon oni devas elekti, la komitato povus komisii la laboron al kiu ajn, zorgante nur, ke la elektitoj estu homoj prudentaj kaj senpartiaj kaj komprenu la tutan respondecon, kiun ili prenas sur sin. Sed kiam la lingvo estus jam elektita kaj oni decidus fari en ĝi ŝanĝojn, kun kiu oni konsiliĝus pri tiu laboro? La plej simpla prudento kaj la plej simpla komprenado de sciencaj metodoj diras, ke pri tia laboro

oni devus konsiliĝi ne kun personoj, kiuj konas la lingvon de *ekstere*, sed antaŭ ĉio kun personoj, kiuj plej bone konas la lingvon *interne*, kiuj plej multe *laboris* por ĝi, plej multe praktike ĝin *uzis* kaj sekve havas en ĝi plej grandan sperton kaj plej bone konas ĝiajn mankojn *efektivajn*. Ĉiu komprenas tre bone, ke fari ŝanĝojn en iu lingvo, gvidante sin nur per ekstera ŝajno kaj ne konsiliĝinte kun personoj, kiuj plej bone konas tiun lingvon, estus tia infanaĵo, kiun certe nenia komitato povus fari, se ĝi traktus sian taskon serioze kaj ne estus sugestiata de personoj, kiuj havas ian kaŝitan celon.

Kaj se la komitatanoj decidos fari ŝanĝojn en Esperanto, kion ili povos ŝanĝi? Se ili ekzemple volos diri, « tiu vorto estas prenita el lingvo, kiun parolas cent milionoj, tial ni elĵetu ĝin kaj prenu vorton el lingvo, kiun parolas cent dudek milionoj », aŭ se ili dirus, « al ni ne plaĉas la praktike tute bona vorto « estas », ni preferas « esas », k. t. p., tio estas ja simpla infanaĵo, kiun seriozaj homoj certe ne permesus al si, ĉar ili komprenus, ke en lingvo, kiu havas jam multejaran vivon, ŝanĝi grandan amason da vortoj pro simpla kaprico, pro ia pure teoria kaj praktike absolute senvalora motivo estus sensencaĵo. Memorante, ke oni atendas de ili ne ian teorian filologian amuziĝon, sed laboron *praktikan*, ili kompreneble ŝanĝus nur tiajn vortojn aŭ formojn, kiuj montriĝis kiel malbonaj *per si mem*, malbonaj *absolute*, grave maloportunaj por la *uzantoj* de la lingvo. Sed se vi trarigardos ĉiujn kritikojn, kiuj estis faritaj kontraŭ Esperanto en la daŭro de dudektri jaroj — kaj Esperanton ja kritikis jam multaj miloj da homoj, kaj certe neniu eĉ plej malgranda el ĝiaj mankoj restis kaŝita — vi trovos, ke la grandega plimulto el tiuj kritikoj estas simple personaj kapricoj. La nombro de tiuj ŝanĝaj proponoj, kiuj efektive povus havi ian praktikan voloron, estas tiel malgranda, ke ili ĉiuj kune okupus ne pli ol unu malgranda folieto, kiun ĉiu povus ellerni en duonhoro; sed eĉ inter tiuj tre malmultaj supozeblaj ŝanĝoj la plej gravaj estas nur plibonigo *ŝajna*, sed en efektiveco ili post pli matura pripenso montriĝus eble nur kiel malplibonigo. Tiel ekzemple la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kion mi antaŭ dekses jaroj proponis, por liberiĝi de la turmentantoj kaj faciligi la propagandon, kaj kion postulas la plimulto de la reformistoj, tiu ŝanĝo en la *nuna* tempo, kaj tiom pli antaŭ la okuloj de registare starigota kaj sekve forton havanta komitato, devas aperi kiel tute ne akceptebla, ĉar ĝi prezentus kripligon de la *interna* valoro de la lingvo, por plaĉi al ĝiaj *eksteraj* rigardantoj, forigon de necesaj gravaj sonoj el la lingvo kaj de libera vortordo kaj klareco por.....ke la presistoj

ne bezonu elspezi kelke da spesmiloj kaj la komencantoj ne havu kelkan malfacilaĵon.

Se vi prenos ian artikolon Esperantan, prezentitan de niaj kontraŭuloj, por senkreditigi Esperanton, vi preskaŭ ĉiam trovos nur unu aferon : grandan amasigon de la plurala finiĝo « j »; tiu malfeliĉa « j », kiun neniu tamen kuraĝas kritiki en la bela greka lingvo, estas la kvintesenco de ĉiuj teruraĵoj, kiujn niaj kontraŭuloj montras en Esperanto !

Unuvorte, ĉiu el vi povas facile konvinkiĝi, ke se iam registare starigota komitato decidos fari ŝanĝojn en Esperanto kaj se tiu komitato traktos sian taskon serioze, ĝi povos ŝanĝi en Esperanto nur tre, tre malmulte; la postkomitata Esperanto restos tute la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata; nur eble kelkaj nunaj formoj fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al pli oportunaj formoj, neniel rompante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ni ĝis nun akiris. Tio estas ne nia pia deziro, sed tion plene certigas al ni simpla logiko kaj prudento, kontraŭ kiu certe nenia serioza komitato volos peki, se ĝi ne volos, ke ĝiaj laboroj restu absolute sen ia praktika rezultato.

Nun mi resumos ĉion, kion mi diris. Logika esploro de la afero montras al ni, ke.

1 : Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto.

2 : La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t. e., per la senrompa vojo de neologismoj kar arĥaismoj.

3 : Se iam aperos la neceso fari en Esperanto ian ŝanĝon, tion povas fari nur aŭ la esperantistoj mem, per komuna interkonsento, aŭ ia grandega forto, sed nepre en plena interkonsento kun la tuta Esperantistaro.

4 : Se iam la Esperantistoj mem aŭ ia granda ekstera forto decidos fari en Esperanto iajn ŝanĝojn, tiuj ŝanĝoj povos esti nur ekstreme malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras aŭ poste faros.

Tio estas la sole ebla natura irado de la aferoj. Ĉiu, kiu volos kontraŭbatali tiun naturan iradon, nur perdos senbezone siajn fortojn. La Esperantaj radikoj de la arbo internacilingva jam tiel profunde penetris en la teron de la vivo, ke ne povas jam ĉiu deziranto ŝanĝi la radikojn aŭ ŝovi a arbon laŭ sia bontrovo.

Karaj kongresanoj ! Ĉio, kion mi diris, ne estas ia aŭtora memfido,

ĉar mi plene konsentas kaj konfesas malkaŝe, ke, por ŝanĝi ion en la natura irado de la internacilingva afero, mi estas tiel same senpova, kiel ĉiu alia persono. Mi defendas fervore nian nunan vojon nur tial ke la nerefuteblaj leĝoj de la logiko diras al mi, ke tio estas la sola vojo, kiu kun plena certeco alkondukos nin al nia celo. Kiu ajn volus ŝanĝi la naturan iradon de la internacilingva afero — tute egale, ĉu li estas malamiko de Esperanto aŭ ĝia plej flama amiko, ĉu li estas senfamulo aŭ eminentulo, ĉu li agas per vortoj aŭ per mono kaj ruzaĵoj, ĉu li estas plej fanatika konservemulo aŭ plej facilanima eksperimentisto de novaĵoj, ĉu li estas plej pura idealisto aŭ plej profitama egoisto, ĉu li bruas kaj malbenas aŭ kaŝite laboras sub la tero — li neniam sukcesos; li povos nur krei kelktempan skismon kaj akiri la malĝojan gloron de malhelpanto kaj subfosanto, sed neniam li povos devigi ĉiujn amikojn de la internacilingva ideo pro iaj sensignifaj bagateloj forĵeti tion, kion ili posedas, kio montriĝis plene vivipova, en kion estas jam enmetita tia multego da laboroj kaj da vivo kaj kio per natura vojo devas iom post iom konstante ensorbi novajn sukojn. Tion devas bone memori ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de lingvo internacia, kaj se ili tion ne memoros, la vivo mem donos al ili la necesan instruon.

Ni povas sekve labori trankvile; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoje tre malfacila kaj sendanka; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj leĝoj de la logiko kaj prudento. Pacience ni semu kaj semu, por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton. Al la Sesa Esperantista Kongreso, kiu sendube enĵetos multe da semoj en la teron Amerikan, mi eldiras mian koran saluton.

L.-L. Zamenhof.

II. — PROTOKOLO DE LA KUNSIDO DE LA LINGVA KOMITATO.

La anoj de la Lingva Komitato, kiuj estis ankaŭ anoj de la Sesa Kongreso, kunvenis la 16-an de Aŭgusto, je la 10-a horo matene, en ĉambro de la George-Washington-Universitato.

Ĉeestis D-ro Zamenhof kaj :

Angla Lingvo : W. G. Adam, D-ro Kellermann-Reed, D-ro Lowell, Mann, Pollen, Reed, Warden.

Franca Lingvo : Colas, Chavet, Rollet de l'Isle.

Germana Lingvo : Arnhold, S-ino Hankel, D-ro Mybs,

Hispana Lingvo : Perogordo.

Rusa Lingvo : Avilov.

D-ro Mybs, vicprezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato prezidas.

D-ro Mybs, prezidanto ds la kunveno, legas la raporton verkitan de S-ro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio, pri la laboroj de tiuj institucioj inter la kvina kaj sesa kongresoj. Tiu raporto estos prezentata al la tuta Kongreso (Vidu aldonon 1-an).

La ĉeestantaro leviĝas, por honori la memorojn de S-roj Cox kaj Gusstaffson, mortintaj anoj de la Lingva Komitato.

Leginte la raporton de S-ro Boirac, D-ro Mybs rimarkigas, ke tiu raporto estas bona respondo al tiuj personoj, kiuj pretendas ke la Lingva Komitato faras nenion, kaj ke ni devas esti tre fieraj kaj kontentaj, ĉar la Lingva Komitato estis tiel prudenta kaj singardema. Li proponas, kaj la kunvenintaro unuanime aprobas, ke oni esprimu dankegon al la Prezidanto de la Lingva Komitato, por tiu interesa raporto.

S-ro Chavet diras, ke oni ne povas diskuti tiun raporton, kiu estas nur resumo de faktoj, sed ke oni povas, okaze de ĉiu parto de ĝi, interŝanĝi interesajn ideojn, kaj ke, el tiu neoficiala diskutado povos rezulti atentindaj deziresprimoj, kiuj estos rigardataj kiel gvidiloj kaj konsiloj por niaj postaj laboroj.

D-ro Mybs, aŭ tiu rimarko, demandas unue, ĉu iu deziras paroli pri la rubriko : *Teknika Vortaro*.

S-ro Rollet de l'Isle legas raporton, kiun li verkis pri la laboroj de la komisio, kiun li direktas, de la Scienca Asocio, pri la teknika vortaro. La raporto de S-ro Boirac, cetere, aludas pri la laboroj de tiu komisio.

D-ro Mybs dankas poste S-ron Rollet de l'Isle, por tiu interesa raporto.

D-ro Arnhold demandas, kiu elektis la nomojn de tiu komisio.

S-ro Rollet de l'Isle diras, ke li estis komisiita de la Scienca Asocio por ilin elekti.

D-ro Arnhold esprimas la opinion, ke bone estus, ke, en tiu komisio troviĝu slavoj kaj reprezentantoj de aliaj lingvoj, ol franca, angla, germana kaj itala.

S-ro Rollet de l'Isle respondas, ke tiu komisio nur donas konsiloju kaj preparas raporton, kiu poste estos publikigita kaj submetita al aprobo aŭ malaprobo de diversnaciaj anoj de la Scienca Asocio. Tiu komisio faras nur preparan laboron.

S-ro Chavet rimarkigas, ke tiu komisio ne estas komisio de la Lingva Komitato, sed de la Scienca Asocio, kaj ke sekve, ni ne povas preni sur nin la taskon diskuti ĝian internan organizon.

S-ro Rollet de l'Isle aldonas, ke por ke tiu prepara laboro povu esti facile farita, oni bezonis havi komision de tre malmutaj personoj.

D-ro Zamenhof rimarkas, ke estas ĉiam tre utile havi slavojn en lingvaj studaj komisioj, ĉar la slavoj staras iom flanke de la grandaj lingvoj kaj povas plej bone kontroli la gradon de internacieco de iu radiko. Tre ofte, oni, en lingvaj laboroj, akceptas vortojn aprobitajn de la plimulto sed tamen ne bonajn, ĉar la vortoj ne estis kontrolitaj de slavoj.

Pri la rubriko kiu koncernas la *gramatikon*, D-ro Mybs atentigas pri la grava verko de S-ro de Saussure, pri derivado, kaj diras, ke tiu verko, laŭ la Majstro mem, estas vere scienca verko, kiu devas esti modelo por ĉiuj postaj lingvaj verkoj pri Esperanto. Cetere, S-ro de Saussure faris resumon de tiu verko en Esperanto por la prezentado al la Akademio, kaj D-ro Mybs proponas, ke la kunvenintaro esprimu gratulojn kaj dankojn al S-ro de Saussure por tiu interesa laboro.

Tiu propono estas unuanime aprobita.

S-ro Chavet diras, ke S-ino Hankel deziras paroli antaŭ la kongreso pri lingva afero, kaj li petas S-inon Hankel klarigi, unue, antaŭ la Lingva Komitato, sian proponon.

Si-no Hankel prezentas sian proponon pri la verkado de universala gramatiko de Esperanto, pli detala ol la Fundamento, kaj diras, ke tia gramatiko estas nepre necesa.

D-ro Mybs rimarkigas ke la demando estas, ne pri gramatiko, sed pri sintakso, kaj ke li estas tute simpatia al la propono.

D-ro Zamenhof opinias, ke ni ne devas tro frue enkateni nian lingvon, ke afero, kiu hodiaŭ ŝajnas al ni bona, povas morgaŭ ŝajni nebona, kaj ke, sekve, pli bone estas, ke ni restu sur la fundamento de niaj dek-ses reguloj, kaj lasu ian elastecon al la lingvo, pri ĉiuj ceteraj punktoj.

Oni diras, ke povas troviĝi dubaj punktoj. Sed ju pli oni legas bonajn verkojn, des pli solviĝas tiuj duboj. Ĉar oni povas respondi ke multaj personoj ne havas tempon multe legi, D-ro Zamenhof proponas, ke kelkaj personoj ellaboru demandaron, kaj sendu ĝin al la Prezidanto de la Lingva Komitato, kiu ĝin transsendos al kompetentaj personoj, kies respondoj estos nur konsiloj, opinioj, sed ne decidoj.

Kiam mi verkis la lingvon Esperanto, diras D-ro Zamenhof, mi unue havis la intencon verki la tutan lingvon, kun ĉiuj detaloj, kaj mi penis traduki ĉiujn vortojn, kiuj troviĝas en la plena kaj multlingva vortaro de Schmidt. Sed mi rapide rimarkis, ke pli bone estus, ke, en la komenco, la lingvo havu nur siajn plej necesajn elementojn, kaj ke mi lasu al la vivo, aŭ al kompetenta akademio, la zorgon plenigi la aferon.

D-ro Mybs tute aprobas la Majstron kaj diras, ke la direkto montrita de li estas la plej bona. Oni nun provas starigi rilatojn inter la grandaj naciaj asocioj. Eble, en iliaj laboroj por verki programojn de ekzamenoj kun listo de la studotaj temoj, ili povus interkonsenti pri starigo de demandaro pri ĉiuj dubaj punktoj, kaj tiu laboro, kiu ne rilatus la Lingvan Komitaton kaj estus kvazaŭ privata, povus tamen esti utila gvido por la esperantistoj kaj havigi al la Lingva Komitato bonan fundamenton por la studado de tiuj gramatikaj punktoj kaj alpreno de oficialaj decidoj pri ili, kiam la tempo estos taŭga.

S-ro Pollen diras, ke li tiel multe suferis pri gramatiko, ke li ne sentas la bezonon de plena gramatiko.

S-ro Mann diras, ke, por faciligi la laboron pri kiu parolis D-ro Mybs, estus bone, ke la demandojn oni sendu unue al la naciaj asocioj kiuj ilin kribros.

D-ro Mybs opinias same, kaj diras ke la ekzamena komisio de la Germana Asocio jam faris tiun preparan laboron.

S-ro Mann diras, ke multaj personoj bedaŭras, ke la Majstro ne daŭrigis siajn lingvajn respondojn. Oni starigu demandaron, kaj oni petu, ke la Majstro respondu per *Oficiala Gazeto*, kaj tio cetere donos grandan intereson al tiu Gazeto.

D-ro Myrs diras, ke la Germana Asocio estas preta prepari tiun demandaron.

S-ro Mann insistas por ke la respondoj de l'Majstro estu farataj per *Oficiala Gazeto*.

Kapitano Perogordo diras ke, en la diversaj nacioj, estas gramatikoj, kiuj, kelkfoje enhavas bedaŭrindajn erarojn, kaj ke ili bezonus esti reviziitaj.

S-ro Chavet diras, ke se la germanoj sentas la bezonon de detala gramatiko, la kaŭzo eble estas, ke ili ne havas, en sia lingvo, tian verkon. La francoj kaj angloj ne tiel forte sentas tiun bezonon, ĉar ili havas la bonajn verkojn de S-ro Cox kaj Aymonier. Cetere, por respondi al la rimarko de S-ro Perogordo, li diras, ke la franca subkomisio pri esploro de la ĉiulanda esperantista verkaro havis la bonan ideon revizii, ne nur literaturajn verkojn, sed ankaŭ gramatikajn, kaj ke li estas persone tre kontenta, ke iu ano de tiu subkomisio reviziis lian lernolibron por francoj. Oni povus esprimi la deziron ke en ĉiuj landoj, la naciaj studkomisioj agu same.

S-ino Hankel diras, ke ne nur la germanoj deziras delatan oficialan gramatikon, sed multaj aliaj nacianoj, kiel montras la aproboj ricevitaj de la Lingvokomitatanoj pri sia projekto. Multaj personoj estas pretaj kunlabori pri tiu afero, kaj inter ili, S-ro Profesoro Rohrbach.

S-ro Chavet diras, ke S-ro Rohrbach faru privatan verkon, kiu poste povos esti reviziata.

D-ro Lowell diras, ke D-ro Kellermann-Reed verkis bonegan gramatikon por angloj, kiu, laŭ lia opinio, estas modela verko, kiu klarigas bone la dek-ses regulojn. Ĝi estas, kion ni bezonas por ĉiu nacio; poste, oni povos klarigi la aferon en Esperanto, kiel jam faris neoficiale S-ro Fruictier.

D-ro Myrs diras, ke la studkomisio por Ameriko studu la libron de D-ro Kellermann kaj dankas S-ron Lowell pro lia rimarko.

D-ro Arnhold diras, ke la germanoj havas tro multe da sintaksoj, ke la germanoj malprave volas ĉiam scii, kio estas permesata, kaj kio estas malpermesata, kaj ke ili ne komprenas, ke, pri tiuj lingvaj aferoj, oni devas lasi sufiĉan liberecon. Li havis saman opinion kiel S-ino Hankel pri la neceseco de oficiala detala gramatiko, sed nun,

post konversacio kun D-ro Zamenhof, li opinias male, ke, en la nuna momento, tia gramatiko ne estas necesa.

D-ro Zamenhof opinias, ke nebone estas verki gramatikojn ĉiam pli kaj pli dikajn, ĉar tiaj verkoj nur fortimigas la lernantojn. En la « Esperantisto » de la unuaj jaroj, oni bone skribis Esperante, kaj tamen, oni havis nur la dek-ses regulojn.

Oni diras, ke Esperanto estas tre facila. Kiam nova varbito volas lerni la lingvon, li volas aĉeti plej bonan libron. kaj oni donas al li la plej dikan. Li do opinias, ke la lingvo estas tiel malsimpla kiel le ceteraj. Ekzemple, en kelkaj gramatikoj, anstataŭ simple montri la verbajn formojn *as, is, os*, tre klarajn, oni presas ĉiujn malsimplajn « mi estas estinta » k. p, t. kaj la lernanto kredas, ke li devas ĉiujn parkere lerni.

D-ro Zamenhof konsilas, ke la verkistoj de gramatikoj antaŭ ĉio represu la dek-ses regulojn, kaj diru, ke tio estas la gramatiko. Poste ili presu sub la titolo « Komentario » diversajn komentariojn pli malpli detalajn, sed la oficiala parto estu nur la dek-ses reguloj.

Tiu deziresprimo de S-ro Zamenhof estas unuanime aprobata.

D-ro Mybs diras, ke la Germana Esperanta Asocio povas doni, al sia ekzamena komisio, la taskon starigi la demandaron pri dubaj punktoj.

S-ro Mann diras, ke tiu laboro devas havi internacian karakteron, kaj ke tiu laboro estas farota, ne de la germana komisio sola, sed de ĉiuj naciaj komisioj, sub la gvidado de la Germana Komisio.

D-ro Mybs tute konsentas kun S-ro Mann.

S-ro Mann petas D-ron Zamenhof diri, ĉu li konsentos doni la lingvajn respondojn al *Oficiala Gazeto*.

D-ro Zamenhof diras, ke li faros tion, se tio estas la deziro de la Lingva Komitato.

La ĉeestantaro unuanime aprobas la proponon de S-ro Mann.

Pri la rubriko : *Studkomisio pri ĉiulanda esperantista verkaro*, S-ro Chavet denove proponas ke la ĉeestantaro esprimu la deziron ke tiu studkomisio esploru, ne nur la literaturajn verkojn, sed ankaŭ la gramatikajn. Tiu propono estas unuanime aprobita.

Pri la rubriko : *Komuna Vortaro,* S-ro Arnhold diras, ke la plej dikaj vortaraj ne estas ĉiam la plej bonaj; li esprimas la deziron, ke en ĉiu vortaro, oni montru per steleto, la vortojn de la Oficiala Universala Vortaro, kaj de ĝiaj oficialaj aldonoj. Li diras, ke ordinare la

lernanto preferas dikan vortaron, por esti certa, ke li trovos la deziratan tradukon de ĉiu vorto.

S-ino Hankel diras, ke ŝi male opinias, ke la germanoj abomenas la dikajn vortarojn.

La propono de S-ro Arnhold, pri la meto de steleto al la oficialaj radikoj, estas unuanime aprobita.

D-ro Mybs rimarkigas, ke en la Oficiala aldono al Universala Vortaro troviĝas malbonegaj vortoj, ekzemple la vorto: *imperialo*, kaj ke oni do devas esti tre singardema por enkonduko de novaj vortoj.

D-ro Zamenhof ne tute aprobas la rimarkon de D-ro Mybs. Laŭ li, en la naci-esperantaj vortaroj, oni devas doni malmute da vortoj, por ne instrui la lernantojn pri superfluaj vortoj, sed en la vortaroj esperanta-naciaj, oni devas doni ĉiujn vortojn troveblajn en esperantaj tekstoj, por ke oni povu legi la esperantajn verkojn. Ekzemple, li diras, mi bezonis la vorton « *arĥeo* » por traduki la Biblio, mi uzis ĝin, sed nun, tiu vorto ne estas plu utila, ĉar oni, en la nuna tempo, ne plu konstruas arĥeojn.

D-ro Mybs diras, ke tiu rimarko estas tre interesa, sed ke povas ekzisti grava danĝero, se la verkistoj ĉiam kutimas uzi novajn vortojn kiuj plej ofte estas simple francaj kaj ne internaciaj vortoj.

S-ro W. G. Adam komunikas leteron de S-ro Geoghegan, unua pioniro de Esperanto en Ameriko, kiu esprimas la opinion, ke la grandaj teknikaj vortaroj estas ofte neutilaj kaj enhavas vortojn nur uzeblajn de malmultaj specialistoj, kiuj, sen la helpo de tiuj vortaroj tamen povus tre bone esperantigi tiujn sciencajn vortojn.

Nenui faras rimarkon pri la *projekto de kronado de verkoj*, nun reverkata de S-ro Cart.

Pri la abono de la Lingvokomitatanoj al *Oficiala Gazeto*, S-ro D-ro Mybs diras, ke tiu afero ŝajnas al li tre grava kaj li altiras la atenton de la ĉeestantaro pri ĝi.

S-ro Chavet klarigas, ke, laŭ la opinio de la Prezidanto mem de la Lingva Komitato, oni ne deziras devigi la Lingvokomitatanojn esti rektaj abonantoj de tiu Gazeto, se ili tion absolute ne deziras, sed la Prezidanto de la Lingva Komitato deziras, ke ĉiu Lingvokomitatano dona al li la certigon ke li efektive iamaniere legas tiun Gazeton kaj ke, sekve, la komunikoj faritaj per ĝi, trafas lin.

Pri la rubriko: *Internaj aferoj*, S-ro Lowel memorigas ke, dum

la pasinta jaro, en Barcelono, oni proponis lian kandidatecon al la Akademio, kaj ke li rifuzis. Li aldonas ke li povas nun proponi, anstataŭe de li, D-ron Ivy Kellermann-Reed, kiel anon de la Akademio por Ameriko.

S-ro Chavet diras, ke tiu propono devas esti resendata al la Akademio.

S-ro Arnhold komunikas deziresprimon de la konsilantaro de la Germana Asocio, ke la novaj Lingvokomitatanoj estu elektataj de la naciaj societoj, proporcie je ilia multmembreco. Li persone aprobas la unuan parton de tiu propono (elekto farita de la asocioj) kaj ne aprobas la duan parton (proporcie je ilia multmembreco).

D-ro Myrs diras, ke tiu propono povas esti denove esplorata de la Germana Asocio.

S-ro Mann demandas, ĉu la anoj de la Lingva Komitato estas efektive lingvaj kompetentuloj, aŭ nur anaro, el kiu oni povas ĉerpi kunlaborantojn por specialaj esploroj.

S-ro Chavet sciigas, ke, laŭ la penso de la personoj, kiuj starigis la Regularon de la Komitato, tiu Komitato estas nur granda konsulta Komitato, kiu povas esti tre multnombra, kaj kies ĉefaj taskoj estas elekti la Akademianojn kaj la novajn Lingvokomitatanojn, subskribi la proponojn al la Akademio, kaj akcepti aŭ malakcepti la decidojn de tiu Akademio. La Akademio sola estas devige grupo de lingvistoj. La Lingva Komitato povas esti ia kribrilo inter la Akademio kaj la tuta esperantistaro.

D-ro Arnhold diras, ke bone estus, ke nur la naciaj asocioj elektu la novajn Lingvokomitatanojn.

S-ro Chavet diras, ke tiuj Asocioj havas la rajton fari kandidatproponojn, sed ke, ĝis nun, ili faris tion tre malmute.

S-ro Mann diras, ke oni diversmaniere komprenas la rolon de la Lingva Komitato.

S-ro Chavet esprimas la privatan opinion, ke cetere, la Akademio ĝis nun ne estis sufiĉe severa, kiam ĝi starigis la liston de la kandidatoj al la Lingva Komitato, kaj ke ĝi tre bone povus doni specialan atenton al la kandidatoj de gravaj asocioj.

S-ro Arnhold diras, ke bone estus, ke nur la naciaj asocioj povu fari la proponojn pri kandidatoj.

S-ro Chavet diras, ke ili havas plenan rajton fari proponojn sed ke ili ĝis nun ne sufiĉe uzis tiun rajton.

S-ro Mann diras, ke la tuta afero ne estas klare komprenata de la publiko kaj ke bezone estas, ke kompetentuloj ĝin klarigu.

S-ro Pollen, je la nomo de la tuta ĉeestantaro, dankas S-ron Mybs kiu tiel lerte prezidis tiun kunvenon.

S-ro D-ro Mybs esprimas denove la dankojn de la tuta ĉeestantaro al S-ro Boirac prezidanto de la Lingva Komitato por lia raporto, kaj dankas ankaŭ la Majstron por liaj interesaj klarigoj.

La kunsido finiĝas je la 11-a horo kaj kvarono.

La Prezidanto: D^ro Mybs. *La protokolisto:* G. Chavet.

III. — OFICIALA PROTOKOLARO DE LA GENERALAJ KUNSIDOJ.

Solena Malferma Kunsido (15 Aŭgusto 1910).

La Solena Malferma Kunsido estas malfermata, je la 10-a horo, en la salonego de la hotelo Arlington.

Kapitano Perogordo, vicprezidinto de la Kvina Kongreso, malfermas la Kongreson. Li aldonas, ke la Konstanta Komitato de la Kongresoj, decidis proponi al la Kongreso, la jenan estraron :

Prezidanto : John Barrett, prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko kaj direktoro de la Oficejo de la Amerikaj Respublikoj.

Vicprezidantoj : D-ro Yemans, vicprezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko; D-ro Ivy Kellermann-Reed, ano de la Loka Organiza Komitato.

Sekretarioj : Gabriel Chavet, sekretario de la Konstanta Komitato de la Kongresoj; Edwin C. Reed, sekretario de la Loka Organiza Komitato.

Tiu propono estas unanime akceptita.

Li sciigas poste, ke la jenaj naciaj vicprezidantoj estis elektitaj :

Britujo : W.-W. Mann.
Francujo : Rollet de l'Isle.
Germanujo : D-ro Mybs.
Hispanujo : Perogordo.

D-ro Hale, reprezentanto de S-ro John Barrett, sciigas, ke S-ro Barrett, malsana, ne povas efektive prezidi la Kongreson, kaj ke li petas D-ron Yemans, vicprezidanto, preni la prezidan lokon.

D-ro Yemans, prenas la prezidan lokon. Li legas, en angla lingvo kaj en Esperanto, la jenan telegramon ĵus ricevitan de S-ro John Barrett :

« Bonvolu prezenti miajn komplimentojn kaj plej bonajn dezirojn

al la delegitoj kaj membroj de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto, nun kunvenintaj en la urbo Washington, kun miaj plej sinceraj bedaŭroj, ke la postuloj de mia kuracado malhelpas, ke mi ĉeestu ĝiajn kunsidojn.

Mi estas profunde interesata pri la Kongreso kaj fidas, ke ĝi havos tre grandan influon, disvatigante la studon de Esperanto, tra Usono kaj la mondo.

Mi ankaŭ gratulas pri la ĉeesto de tiom da sinjoroj kaj sinjorinoj, el ekster Usono, kiuj distingiĝis en la propagando de tiu lingvo. Mi esperas reveni al Washington merkredon vespere, kaj havi la honoron akcepti la delegitojn kaj membrojn en la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj. »

D-ro Myrs, ano de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj vicprezidanto de la Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio diras, ke li havas la taskon anstataŭi Generalon Sebert, prezidanto de la Konstanta Komitato, kaj Rektoron Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio. Li legos, en la postaj kunsidoj, la raportojn de ili verkitajn. Li memorigas pri la grandaj servoj faritaj al Esperanto de S-roj Sebert kaj Boirac kaj proponas, ke oni sendu al ili salutan kaj dankan telegramon. Tiu propono estas unanime akceptata.

S-ro Chavet, sekretario, deklaras, ke tiu Kongreso estas la plej grava kongreso, kiun ni havis, ĝis nun, laŭ la vidpunkto de la registaraj reprezentadoj. Li donas la liston de la jenaj 16 registaroj, kiuj sendis reprezentantojn :

Brazilujo sendis S-ron Mello Souza.

Ekvatorio.

Gvatemalao sendis S-ron Francisco Sanchez Latour, komisiito en Washington.

Ĥinujo sendis S-rojn Lu Ping Tien kaj Wu Chang, sekretarioj de la Ambasadorejo en Washington.

Hispanujo sendis Kapitanon Perogordo.

Honduras (hispana) sendis D-ron Guillermo Moncada, ĝenerala konsulo en New-York.

Kosta-Rica sendis S-ron Joaquim Bernardo Calvo, plenrajta ministro en Washington.

Meksikujo sendis S-ron Ricoy, unua sekretario de la Ambasadorejo en Washington.

Persio sendis S-ron Ali-Kuli-Khan, komisiito en Washington.

La Ministro de Komerco de *Rusujo* sendis Kapitanon Postnikov.

Urugvajo sendis S-ron Enriquo Munoz.

La Departamento de tera militistaro de *Usono* komisiis D-ron Yemans.

La Departamento de marista militistaro komisiis S-ron Charles Stewart, superintendanto de la arkivoj.

La departamento de internaj aferoj, fako de instruado, komisiis neoficiale S-ron Wolcott, bibliotekisto, kaj petit S-ron Reed verki raporton por enpreso en la jara raporto de tiu Departemento.

La *Ŝtato Karolino* sendis S-ron Dibble.

La *Ŝtato Florido.*

La *Ŝtato Luisiano* sendis S-ron J.-G. Haupt.

La *Ŝtato Oregon* sendis S-ron J.-C. Cooper.

S-ro Chavet aldonas ke S-ro Charles W. Stewart estas speciala reprezentanto de la Amerika Nacia Ruĝa Kruco.

S-ro Wu Chang, reprezentanto de la ĥina registaro salutas la Kongreson en ĥina lingvo, promesas fari favoran raporton al sia Registaro kaj esperas, ke tiu registaro decidos tuj enkonduki la lingvon en la lernejojn de Ĥinujo.

Poste parolas en Esperanto S-ro Mello Souza, je la nomo de la registaro de Brazilujo; Kapitano Perogordo, je la nomo de Hispana Registaro; S-ro Moncada, je la nomo de la hispana Honduras; S-ro Munos, je la nomo de Urugvajo; Kapitano Postnikov, je la nomo de la Ministro de komerco de Rusujo; S-ro Stewart, je la nomo de la département de marista militistaro de Usono, kaj S-ro Dibble, je la nomo de Ŝtato Karolino.

D-ro Hale, je la nomo de la Internacia Oficejo de Amerikaj Respublikoj salutas la Kongreson, dirante, ke la plej sincera saluto el ĉiuj povas esti farita nur en la lingvon Esperanto.

S-ro Chavet, sekretario, legas telegramojn kaj leterojn ricevitajn de ĉiuj partoj de la mondo, salutante D-ron Zamenhof kaj la Kongreson, kaj inter ili, leteron de la estraro de la Unua Kongreso de U. E. A. en Augsburg, kaj leteron de S-ro Pujula, prezidinto de la Kvina Kongreso, kiu bedaŭras, ke li ne povas ĉeesti kaj malfermi mem la Sesan Kongreson.

D-ro Yemans, prezidanto, proponas ke la Kongreso sendu salutan telegramon al Prezidanto Taft. Tiu propono estas entuziasme aprobita.

D-ro Zamenhof faras sian kutiman malferman paroladon kaj salutas Usonon, landon de libereco. Lia parolado estas ofte aplaŭdata, kaj je la fino, D-ro Zamenhof ricevas entuziasmajn ovaciojn.

La kunsido estas fermata, post kanto de la *Espero*.

Dua Kunsido (15-an de Aŭgusto 1910).

La kunsido estas malfermata je la 2-a horo, en la salonego de la Hotelo Arlington.

D-ro Yemans, vicprezidanto de la Kongreso, prezidas.

S-ro Chavet, sekretario, legas la protokolon de la unua kunsido. Ĝi estas aprobita sen rimarko.

S-ro Chavet, legas novajn telegramojn ricevitajn de diverslandaj esperantistaj asocioj kaj personoj.

S-ro Yemans proponas, kaj la Kongreso akceptas, kun granda entuziasmo, la sendon de telegramon al Sinjoro Roosevelt, kiu ĉiam montris sin simpatia al nia movado.

S-ro Chavet, sekretario, komunikas la nomojn de la naciaj delegitoj elektitaj de la kongresanoj.

Eŭropo.

Aŭstrio	Gottschall.
Kroata lingvo	Plesche.
Britujo	Sharpe.
Skota lingvo	Warden.
Irlando	Pollen.
Kimra lingvo	S-ino Theodore.
Francujo	Cotton, Le Bihan.
Germanujo	D-ro Arnhold, S-ino Hankel.
Gibraltar	Pollen.
Hispanujo	Perogordo.
Malta	Yemans.
Rusujo	Postnikov.
Litova lingvo	Tabenski.
Pola lingvo	S-ino Essigmann.
Svisujo	Forestier.

Azio.

Hindujo..... Tedmann.

Afriko.

Sudafriko..... Carter.

Ameriko.

Brazilujo..... Querino de Olivera.
Kanado..... John-M. Geldert.
Meksikujo..... Félix Vualobros.
Ĉilo..... Mello Souza.
Porto-Riko..... Negron Sanjurjon.
Peruo..... Reed.
Urugvajo..... Munoz.
Usono..... Spillmann.

Oceanio.

Filipinaj Insuloj..... Osmeña.
Aŭstralio..... Skurrie, Fryer.

Tiuj delegitoj, unu post la alia, salutas la Majstron kaj la Kongreson kaj donas sciigojn pri la esperantista movado en siaj respektivaj landoj, je la nomo de siaj esperantistaj samlandanoj, kaj kelkfoje, je la nomo de gravaj naciaj esperantistaj asocioj, kiujn ili reprezentas.

Poste parolas S-ro Benjamin Wolf Reich, je la nomo de la parolantoj de la hebrea lingvo.

S-ro Prezidanto poste fermas la kunsidon, sciigante ke kelkaj specialaj asocioj aŭ movadoj deziras saluti la kongreson, ne oficiale, por respekti la neŭtralecon de niaj esperantistaj kongresoj. Tiuj salutoj estas faritaj, de S-ro Postnikov, je la nomo de la Universala Ligo; de S-ro Albert Warrington, je la nomo de la Teosofia Asocio, kaj de S-ro D-ro Farred, el Ispahan, je la nomo de la Baha'a movado.

Tria Kunsido (17-an Aŭgusto 1910).

La tria kunsido estas malfermata, je la 10-a horo, matene, en la salonego de la hotelo Arlington.

D-ro Yemans, vicprezidanto de la Kongreso prezidas.

S-ro Chavet, sekretario legas la protokolon de la antaŭa kunsido, kiu estas aprobita sen rimarko.

D-ro Yemans komunikas al la Kongreso, la jenan telegramon ricevitan de Prezidanto Taft :

« *La Prezidanto dankas vin kore por via saluta telegramo kaj sendas siajn plej bonajn dezirojn por la sukceso de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto* ».

Tiu telegramo estas varme aplaŭdata.
S-ro Chavet, legas telegramojn kaj leterojn ricevitajn.

D-ro Yemans sciigas pri la bedaŭrinda morto de S-ro Montt, prezidanto de la Respubliko de Ĉilo, kaj proponas, ke, por honori lian memoron ĉiuj ĉeestantoj leviĝu. D-ro Yemans diras, ke pro tiu funebro, la akcepto farota de S-ro John Barrett, en la Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, ne povos okazi.

S-ro Negron, delegito de la esperantistoj de Porto-Rico, salutas la Kongreson.

D-ro Mybs, ano de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, prezentas, je la nomo de tiu Komitato, la raporton de Generalo Sebert, pri la agado de la Komitato inter la Kvina kaj la Sesa Kongresoj. Li legas la tekston de tiu raporto, kiu estis antaŭe disdonita al la Kongresanoj. Li dankas la Lokan Komitaton, por la klopodoj faritaj ĉe la Registaroj, kiuj tiel bone sukcesis. Li legas la proponojn de deziresprimoj, prezentitaj en la Raporto, kaj varme ilin apogas. Laŭ li, oni bezonas doni al niaj kongresoj seriozan karakteron, kaj starigi kunvenojn de personoj regule rajtigitaj kaj kiuj sekve havus la eblon alpreni efikajn decidojn. Li proponas, ke oni unuanime akceptu la proponojn de la raporto, kaj danku Generalon Sebert, pro liaj bonaj laboroj por nia afero (vidu aldonon 2-an).

La Kongreso unuanime aprobas la proponojn entenatajn en la raporto.

Kapitano Postnikov, prezidanto de la Rusa Esperantista Ligo, prenas la parolon por memorigi ke la unua kunveno de la rusaj esperantistoj decidis proponi, ke la Kongreso de 1912, 25-a jubileo de Esperanto, okazu en Rusujo, kie estas multaj urboj taŭgaj por tia kongreso. La rusaj esparantistoj diros en Antverpeno, kiun urbon ili opinias elektinda..

S-ro Chavet deklaras, ke la fina decido pri la urbo de la proksimaj kongresoj, laŭ la teksto de la ĵus legita raporto, estas alprenota de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, sed ke tamen, estas tre utile kaj interese aŭdi, en la Kongresoj mem, la diversajn proponojn. Li sciigas, ke la Konstanta Komitato ricevis, antaŭ jam unu jaro, propronojn por ke la Kongreso de 1912 okazu en Krakovio, kaj antaŭ du monatoj, tiu propono estis denove prezentita al la Komitato, de la tri prezidantoj de la Unua aŭstria Esperanto-Tago en Wien kiuj estas, unu pola, unu bohema kaj unu germana.

Poste, S-ro Chavet diras, ke li ricevis la komision inviti la kongreson de 1913 en Italujo. Li sciigas, ke la italaj esperantistoj havis unuan nacian kunvenon, dum tiu ĉi jaro. kaj ke. en tiu kunveno, ili fondis italan Federacion kaj decidis proponi sian belan landon por la Kongreso de 1913. S-ro Chavet diras, ke ĉiu kongreso de Esperanto havas la rezultaton vigligi multe la propagandon en la lando, kie ĝi okazas, kaj ke sekve kongreso en Italujo estos tre utila por helpi la disvastiĝon de nia lingvo en tiu lando.

S-ro George Warnier sciigas, ke la Parizaj esperantistoj jam faras la projekton organizi kongreson de Esperanto en Paris en 1914, kaj ke, se tiu Kongreso estos decidita, ĝi povos certe kunvenigi tre grandan multegon da esperantistoj de ĉiuj landoj. Tiu kongreso estos bona okazo por festi la dekan Kongreson.

S-ro Doktoro Mybs, vicprezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio, prezentas la raporton de S-ro Boirac pri la agado de tiuj institucioj.

Li proponas, kaj la Kongreso akceptas, ke la ĉeestantaro leviĝu je la honoro de la Lingvokomitatanoj, mortintaj dum la jaro.

D-ro Zamenhof diras, ke, je la sama okazo, oni honoru per leviĝo, ĉiujn esperantistojn mortintajn dum la jaro.

Finante la legadon de la raporto de S-ro Boirac, S-ro Mybs komunikas al la Kongreso la dezirojn esprimitajn en la kunsido de la Lingvokomitatanoj, kiu okazis dum tiu ĉi Kongreso. kaj li proponas, je la aplaŭdo de ĉiuj, ke la Kongreso danku S-ron Boirac por lia raporto kaj esprimu sian plenan konfidon al la Lingva Komitato.

Kolonelo Pollen substenas tiun proponon, kiun la Kongreso unuanime aprobas.

D-ro Yemans komunikas al la Kongreso leteron ricevitan de la Prezidanto de la Aga Komitato de la Universala Ekspozicio de New-

York, kiu okazos en 1913. Tiu Sinjoro diras, ke, dum la Ekspozicio okazos kunveno de reprezentantoj de ĉiuj parlamentoj en la mondo. Li scias, ke lingvo Esperanto estas tre facile lernebla kaj uzebla, kaj li proponas, ke oni zorgu, por interesi pri Esperanto la personojn, kiuj partoprenos en tiun kunvenon, kaj ke oni, se eble, instruu ilin pri Esperanto. Li plie sugestias, ke oni faru, je tiu okazo, Kongreson de Esperanto en New-York.

D-ro Yemans fermas la oficialan kunsidon kaj donas la parolon al S-ro Morrisson (Frank), sekretario de la Amerika Federacio de Laboro, kiu deziras saluti neoficiale la Kongreson.

S-ro Morrison, diras, ke li estas tre ĝoja saluti reprezentantojn de tiel multe da diversaj nacioj. Li estas konvinkata, ke Esperanto taŭgas por ĉiuj temoj kaj okazoj de la vivo, kaj lia konvinko fortiĝis, kiam li vidis la prezentadon, en Esperanto, de teatraĵo, kiu prezentas ĉiujn homajn pasiojn. Li diras ankaŭ, ke ekzistas, en la mondo, multaj naciaj laboraj organizaĵoj, kiuj havas, ĉiu dua jaro, internacian kongreson, kaj li estas tute certa, ke, kiam tiuj kongresoj povos okazi en Eeperanto, la diskutoj povos esti multe rapidigitaj kaj faciligitaj, kaj ke tiu uzo multe helpos la disvastiĝadon de la frataj sentoj inter ĉiuj popoloj de la mondo. Li finas, esperante, ke la estonta internacia lingvo, kiu ludos tiun belan rolon, estos Esperanto.

Fine, S-ro Claudius Colas salutas ankaŭ neoficiale la Kongreson, je la nomo de la Katolika Esperantista Unuiĝo, kiun li reprezentas. Li raportas pri la grandaj progresoj faritaj de Esperanto, en la katolikaj rondoj kaj pri la grava sukceso de la Unua Katolika Kongreso Esperantista.

Solena ferma Kunsido (20 Aŭgusto 1910).

La Solena Ferma Kunsido estis malfermata je la 10-a horo en la salonego de la hotelo Arlington.

D-ro Yemans prezidas. Li ĝojas pro la sukceso de la kongreso kaj precipe pri la granda nombro de la oficialaj delegitoj kaj dankas ĉiujn, kiuj partoprenis en la organizado de la kongreso. Li dankas ankaŭ la eŭropanojn, kiuj venis multnombraj, la ĵurnalistojn, kiuj raportis tiel afable pri la kongreso, Ges-rojn Reed kaj la lokan komitaton pro iliaj laboroj.

S-ro Chavet legas la protokolon de la antaŭa kunsido, kiu estas aprobita kun rimarko de D-ro Myrs.

S-ro Chavet legas novajn leterojn kaj telegramojn ricevitajn.

S-ro Ricoy, delegito de la meksika registaro salutas la kongreson en Esperanto, kaj deziras al ĝi bonan sukceson.

S-ro Cooper, oficiala delegito de la ŝtato Oregon, kaj S-ro Haupt, en la nomo de la stato Luisiana, salutas ankaŭ la kongreson. Tiu lasta proponas ke la kongreso de 1915 okazu en New-Orleans, samtempe kun la granda ekpozicio kiun oni projektas pro tiu dato, por festi la malfermon de la Kanalo de Panama.

S-ro Sinclair Lewis proponas, ke la kongreso de 1915 okazu en San Francisco por konigi Esperanton al la Kalifornianoj kaj Kalifornion al la Esperantistoj. Li aldonas, ke San Francisco esta centra loko por Eŭropo, Ameriko kaj Azio.

Poste S-ro Grosvenor Dawes reprezentanto de la Suda Komerca Kongreso, parolas je la nomo de la organizantoj de la Komisio en New Orleans kaj invitas la Esperantistojn veni en tiun faman urbon apud la golfo Meksiko.

D-ro Yemans dankas pro tiuj diversaj invitoj, kaj rimarkigas, ke jam multaj urboj konkurencas pro altiri al si esperantistajn kongresojn kaj ke tio estas signo de nia prospero.

S-ro Joaquin Bernardo Calvo, oficiala delegito de Costa Rica, salutas la kongreson, kaj deziras al ĝi sukceson.

S-ro Chavet raportas pri diversaj proponoj ricevitaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj : 1° Propono de la Holanda Societo Esperantista por ke la membroj de la Lingva Komitato estu elektataj de la organizitaj esperantistoj de la koncernitaj landoj; 2° Propono de S-ro Warrington pri la ligo pri monda federacio; 3° Propono de S-roj Twombly kaj Scott por ke oni sendu esprimon de respekto al S-ro Schleyer, eltrovinto de Volapuk, kaj por ke oni nomu tiun sesan kongreson la Naŭa Internacia Kongreso, ĉar estis antaŭ niaj esperantistaj kongresoj tri kongresoj de Volapuk.

Pri la propono de la Holanda societo S-ro Chavet diras, ke la Konstanta Komitato de la Kongresoj decidis ĝin resendi al la esploro de la Lingva Komitato, kiu cetere jam ricevis por esploro similan proponon de la Germana Esperantista Asocio.

Pri la propono de S-roj Twombly kaj Scott, S-ro Chavet sciigas,

ke la Konstanta Komitato de la Kongresoj opiniis, ke ne konvenas nomi nian sesan kongreson la naŭa internacia, kaj ke, S-ro Schleyer ricevinte dum la Unua Kongreso, la pruvon de la estimo de la Esperantistoj, ne estas hodiaŭ motivo por ĝin esprimi denove.

D-ro Zamenhof klarigas, en kelkaj vortoj, la opinion de la Konstanta Komitato pri la propono de S-roj Scott kaj Twombly. Li diras, ke efektive S-ro Schleyer ĉiam havas la estimon de la Esperantistoj, kiuj ne povas forgesi la grandan servon, kiun li faris al la idea de lingvo internacia, sed ke efektive oni ne havas pretekston sufiĉan por ĝin esprimi denove speciale hodiaŭ.

La decidoj de la Konstanta Komitato pri la propono de la Holanda Societo kaj pri la propono de S-roj Scott kaj Twombly, estis unuanime aprobitaj.

S-ro Warrington proponas al la Kongreso decidon pri la rezolucio de la usona Kongreso, nomi internacian komision ritale al universala paco.

D-ro Yemans subtenas ĉi-tiun proponon, kiun la Kongreso aprobas unuanime.

S-ro Chavet donas sciigon pri la nombro de la kongresanoj. Enskribiĝis 274 usonaj samideanoj, kaj se oni supozas, ke Usono enhavas dekoble malpli da Esperantistoj, ol Eŭropo, sur territorio egale granda, se oni rimarkas, ke kiam oni faras kongreson en Eŭropo venas mil Eŭropanoj, oni devas esti tre ĝoja, ke preskaŭ tri cent Usonaj Esperantistoj venis al la Kongreso en Washington. Tiuj usonaj Esperantistoj apartenas al 35 ŝtatoj.

83 eksterusonaj Esperantistoj enskribiĝis en la Kongreso, el 21 diversaj nacioj, kaj do ankaŭ laŭ sia diversnacieco, tiu kongreso estas tre kontentiga (vidu aldonon 4-an).

S-ro Francisco Sanchez Latour, oficiala delegito de Gvatemala, salutas la Kongreson, kaj diras, ke, vojaĝinte tre ofte en Eŭropo, li konstatis mem kiom internacia lingvo estus utila.

S-ro Warnier, je la nomo de la eŭropaj kongresanoj, dankas la usonajn samideanojn pri ilia kora akcepto, kaj certigas ilin, ke kiam ili venos Eŭropon, oni faros ĉion eblan por ke ili ankaŭ sentu sin hejme.

S-ro Henry-D. King proponas, kaj la Kongreso unuanime akceptas, danki S-ron Charles L. Tate, kaj Pastron Smiley, kiuj sukcese

klopodis por enkonduki Esperanton en la publikajn lernejojn de la ŝtato Maryland.

S-ro Spillmann proponas, kaj la Kongreso unuanime akceptas, danki S-ron Osmeña kaj ĉiujn oficistojn de la organiza Komitato de la kongreso.

Kapitano Postnikov petas, ke oni sendu al li informojn kaj sciigojn por la raporto, kiun li devas fari pri la kongreso, al la Ministro de Komerco kaj Industrio de Rusujo.

S-ro Chavet, sekretario, legas la kongresan decidaron. (Vidu aldonon 3an).

D-ro Yemans, je la nomo de la kongreso, dankas S-ron Chavet pro liaj sekretariaj laboroj.

S-ro Reed proponas, kaj la kongreso aprobas unuanime, dankojn al la prezidanto de la kongreso, S-ro John Barrett, por la helpo kiun li donis, kaj al la vicprezidanto, D-ron Yemans, kiu tiel lerte kondukis la kunsidojn de la Kongreso, kaj ankaŭ al la policanoj, la organizantoj kaj geaktoroj de la prezentado de « Kiel Plaĉas al Vi », kaj ankaŭ al la eldoninto de la esperanta libro pri la basbala ludo.

D-ro Zamenhof diras, ke, laŭ la tradicio, li devas fermi la Kongreson per kelkaj vortoj. Li konstatas, ke la sukceso de la Sesa Kongreso superis ĉiujn esperojn, precipe laŭ la vidpunkto de la oficialaj reprezentoj. Li dankas la usonan registaron, kiu sendis la oficialajn invitojn, kaj la multajn registarojn, kiuj akceptis ilin; li dankas la urbajn aŭtoritatulojn de Washington, Ges-rojn Reed kaj la lokan komitaton, kaj fine la ĵurnalojn, kiuj afable raportis pri la kongreso. Li poste deklaras, ke la Sesa Kongreso estas fermita, kaj ĉiuj ĉeestantoj disiĝas post kanto de La *Espero*.

Dro Yemans, *vicprezidanto.*

Gabriel Chavet, *sekretario.*

IV. — ALDONOJ AL LA PROTOKOLARO.

1ª ALDONO.

Raporto de S-ro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato pri la laboroj de la Komitato, inter la kvina kaj sesa kongresoj.

Estimataj Samideanoj,

Ĉar mi ne povas tre bedaŭrinde ĉeesti nian Sesan Kongreson, mi petis de nia merita kolego, Doktoro Mybs, vicprezidanto de la Lingva Komitato, ke li bonvolu anstataŭi min kaj reprezenti nian Komitaton en ĉiuj manifestoj de la Kongreso. Li do, en mia nomo, salutos la anojn de la Sesa Kongreso kaj speciale la ĉeestantajn lingvokomitatanojn kaj transdonos al vi miajn korajn bondezirojn por la sukceso de la Kongreso. Mi ankaŭ petis lin, ke li bonvolu legi, aŭtaŭ la Kongreso, la jenan raporton pri la laboroj de la Lingva Komitato, inter la kvina kaj la sesa kongresoj.

Ĉiuj aktoj de la Lingva Komitato estas regule publikigitaj en ĝia oficiala organo *Oficiala Gazeto*. Per tio, la esperantistoj de la tuta mondo povas esti konstante informataj pri la agado de la Komitato kaj de ĝia Akademio. Tamen, utile estas, ke, unufoje ĉiujare, oni faru ĝeneralan esploradon pri la laborado de la Komitato dum la jaro, kaj ke oni konstatu, per tiu resuma recenzo, ĉu la Komitato daŭrigis sekvi sian normalan vojon.

Subkomitato pri la propraj nomoj.

Ni publikigis, en *Oficiala Gazeto*, ĉiujn raportojn de tiu Komitato, kaj ankaŭ la liston de la tradukoj de propraj nomoj, definitive starigitan de S-roj Bein, Moch kaj Schröder. Por diskonigi, kiel eble plej bone, tiujn interesajn laborojn, ni ilin represigis en aparta broŝuro. En antaŭparolo de tiu broŝuro, mi diris, ke la Lingva Komitato, alpreninte neniun decidon pri la proponitaj listoj de tradukoj de

propraj nomoj, tute ne intencas trudi tiujn tradukojn al la publiko. Cetere, por kelkaj nomoj, la proponitaj tradukoj estas duoblaj, pro malsameco de opinioj inter la tri verkintoj. Oni nur celis, per tiu publikigo, gvidi la publikon, al kiu apartenas, « se ĝi deziras, ekprovi tiujn novajn formojn, ilin eksperimenti kaj konstante uzi, se ĝi trovos ilin praktikaj ».

Post la publikigo de tiu verko, ni ricevis novajn proponojn pri tiu temo, nome de S-roj Parisot, el Plombières, kaj George Wirenius, el Baden-Baden, S-ro Profesoro Köppen, el Hamburg altiris nian atenton pri studo, kiun li faris, kaj publikigis en *Scienca Revuo* (1908). Ĉar la subkomitato pri Propraj Nomoj nun fakte ne plu ekzistas, ni rezervas tiujn novajn proponojn por ebla posta studado.

Sekcio pri teknika vortaro.

Nia kolego, S-ro René de Saussure, decidis forlasi siajn oficojn de sekretario de la *Scienca Asocio*, kaj de direktoro de la *Scienca Revuo*, por sin dediĉi plene, al la laboroj de tiu Sekcio. En la raporto, kiun li sendis al mi en novembro de la pasinta jaro, raporto publikigita en *Oficiala Gazeto*, li klarigis sian metodon kaj siajn intencojn. Li unue prenis, kiel bazon de laboro, la vortaron teknikan de S roj Verax, Fruictier kaj Mann, publikigitan en Scienca Revuo, kaj sendis ĝin al ĉiuj Lingvokomitatanoj, por ke ili resendu ae li siajn rimarkojn. Li elektis tiun iom malnovan verkon, ĉar ĝi estas la sola, kiu estas multlingva. Cetere, antaŭ kelka tempo, nia kolego, S-ro Verax publikigis Teknikan Vortaron, kiu donas, por ĉiu vorto, la difinon ed Esperanto, kaj tiu laboro estos bonega materialo por la studadoj de tiu Komisio.

Plie, la Scienca Asocio starigis dum la Kvina Kongreso, specialan sciencan kaj teknikan komision por verki konsilaron pri la verkado de la novaj sciencaj kaj teknikaj vortoj kaj de vortaro de puraj sciencoj.

Tiu komisio havis en Paris 30 kunsidojn, sub la prezido de nia kolego S-ro Rollet de l'Isle, kaj ĝi starigis la unuan parton de sia tasko. La manuskripto estos publikigita en *Scienca Revuo* ĉe la fino de 1910.

Sekcio pri Gramatiko.

S-ro Grabowski, direktoro de tiu Sekcio ricevis interesajn monografiojn pri esperanta gramatiko, nome de S-roj Aymonier, Kabanov

kaj Eggleton. Se necese, ili estos publikigitaj. En la lasta numero de *Oficiala Gazeto*, ni publikigis la monografion de S-ro Eggleton pri la uzo de la prepozicio AL, kaj ĝi estos studata, kun intereso kaj utileco, de ĉiuj esperantistaj gramatikistoj.

S-ro Grabowski ankaŭ respondis, ĉu aparte, ĉu per la *Oficiala Gazeto*, kiam la demando havis ĝeneralan intereson, al diversaj demandoj pri gramatikaj punktoj, kiujn ni ricevis, ekzemple pri uzo de *iĝ* kaj *iĝ*, pri prefikso *mis*, pri akuzativo, k.t.p...

Pri diversaj proponoj ricevitaj de S-roj Cardenas, el Genève, Köppen, el Hamburg, de S-ino Hankel, el Dresden, Šatat, el Königsberg, ni petis de la aŭtoroj ke, laŭ la Regularo, ili subskribigu siajn proponojn de kvin Lingvokomitatanoj.

S-ino Hankel transsendis al mi proponon, ke la Lingva Komitato petu la kunlaboradon de Doktoro Zamenhof por verki gramatikon pri Esperanto, iom pli detalan ol la « Fundamento », kaj ke nia Majstro sendu klarigojn pri al li konataj dubaj punktoj de la esperanta gramatiko. Tiu propono estis subskribita de pli ol tri-dek Lingvokomitatanoj. Mi respondis al ŝi, ke, mi devige prezentos la aferon al la Akademio, kiu decidos, sed ke, laŭ la opinio de multaj eminentaj samideanoj, ne venis ankoraŭ la tempo por verki tian devigan plenan gramatikon, ke tia laboro nun povus esti nur malutila por la normala evolucio de nia lingvo, kaj ke tiu gramatiko verkiĝos mem per la grupigo de la interesaj monografioj pri gramatiko nun kolektataj de nia speciala Sekcio.

Fine, ni ricevis lastamomente de S-ro René de Saussure, tre interesan studon pri la derivado en Esperanto, kun propono al la Akademio.

Sekcio pri komuna Vortaro.

Post la publikigo de la *Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro*, ni ricevis de S-roj Mikolajski kaj de Ladevèze proponojn pri ŝanĝoj de kelkaj el la vortoj, enmetitaj en tiun Aldonon. Kompreneble, oni ne povas nun esplori tiun proponon, kaj nur estas eble ĝin rezervi por posta eldono de tiu verko.

S-roj J. Borel, J. Camercasse kaj la Rumana Societo, sendis al ne proponojn pri revizo de la esperantaj vortaroj kaj preparo de vortaro esperanto-esperanta. Ni ilin transsendis al la direktoro de la Sekcio, S-ro Th. Cart, kiu decidis prepari specialan raporton pri la starigo de tia vortaro.

Aliparte S-ro Elb, kun la aprobo kaj helpo de multaj Lingvo-

komitatoj, ellaboris tre gravan projekton pri sistema esplorado kaj kontrolado de la tuta vortaro de nia lingvo, efektivigota de la Lingva Komitato. La materialo por tiu ĉi granda labora estas jam preta dank'al tri verkoj, Vortaro de Esperanto de Kabe, Enciklopedia Vortareto de Verax, Plena Vortaro de Boirac, kiujn iliaj aŭtoroj metos sendube al la dispono de siaj kolegoj por tiel interesa kaj utila tasko. Kiam ĉiuj elementoj kaj formoj de la lingvo estos tiamaniere revizitaj, oni povos eble provi la verkadon de oficiala plena vortaro, ne nur esperanto-esperanta, sed ankaŭ esperanto-seslingva, t. e. angla, franca, germana, kispana, itala, rusa, kies cetere kelkaj partoj estas jam nun en preparado. Mi esperas ke ĉiuj Esperantistoj favore akceptos tiun projekton, kaj penos helpi, ĉiu laŭ sia povo, ĝian tre dezirindan sukceson.

Studkomisioj pri ĉiulanda esperanta verkaro.

Vi scias, ke, dum la kunsidoj de la Lingva Komitato en Barcelono, oni esprimis la deziron ke estu kreataj studkomisioj por esplori, en ĉiu lando, la verkojn aperantajn.

Per *Oficialo Gazeto*, vi konas jam la laborojn de la franca studkomisio, tre ageme direktita de nia kolego J. Evrot, el Limoges. La dana studkomisio ankaŭ estas starigita. La pola studkomisio estas organizita de nia kolego Zakrzewski, el Varsovio, kiu baldaŭ konigos al ni la nomojn de la elektitaj de li kunlaborontoj. Kaj mi scias, ke la kataluna studkomisio estas nun en laboro.

Projekto de regularo pri kronado de verkoj.

Laŭ decido de la Lingva Komitato en Barcelono, S-ro Th. Cart verkis unuan tekston de projekto de regularo pri kronado de verkoj. Tiu projekto estis submetata al la aprobo de la akademianoj. Du akademianoj montriĝis principe kontraŭaj al la proponita teksto. Kvar kaj la raportinto plene aprobis la projekton, kaj kvar postulas malgravajn ŝanĝojn pri kiuj, laŭ la raportinto, la akordiĝo estas tre facila. Sekve, S-ro Cart ree esploras la aferon kaj sendos novan redaktaĵon.

Oficiala organo.

Vi scias, ke la oficiala organo de nia Lingva Komitato estas *Oficiala Gazeto*, en kiu ni enpresas ĉiujn cirkulerojn al la komitatanoj kaj

ĉiujn lingvajn dokumentojn kaj studojn, kiuj koncernas ilin kaj ankaŭ tiujn, kiuj koncernas la tutan publikon. Ni petis, per speciala letero, ke ĉiu Lingvokomitatano bonvolu aboni ĉu persone tiun Gazeton, ĉu per la intermeto de siaj lokaj grupoj aŭ societoj, por doni efektivan pruvon, ke li ne ignoras la laborojn de la Komitato kaj interesiĝas pri ili. Preskaŭ ĉiuj akceptis plenumi tiun peton. Cetere, unu el la lastaj numeroj de tiu *Gazeto* estis sendata al ĉiuj esperantistaj grupoj en la mondo kun speciala alvoko, por peti de ili abonon.

Sub la rubriko : Lingva Komitato, de tiu *Gazeto*, ni publikigas, ne nur la oficialajn decidojn, sed ankaŭ, kiel mi jus diris, ĉiujn dokumentojn kaj traktaĵojn utilajn pri la lingvo sed la publiko neniam povas erari, ĉar ĉiu oficiala decido de la Komitato estas klare montrata. Mi diras tion por respondi al esprimitaj timoj pri tio.

Sekcio pri internaj aferoj.

Dum tiu jaro, ni malfeliĉe sciiĝis pri la morto de du el niaj kolegoj, de la Komitato, Sinjoro Generalo-Majoro Cox, vicprezidanto de la Brita Esperanta Asocio, kaj Sinjoro Gustaffson, subite mortigita de fervoja katastrofo. Ni hodiaŭ sendas al ilia memoro, la esprimon de niaj doloraj bedaŭroj.

Tri Lingvokomitatanoj sendis sian eksiĝon, S-roj O'Connor kaj Lambert, pro tro grandaj okupadoj, kaj S-ro Twombly.

Tiu lasta kolego eksiĝis, ĉar li opinias, ke la Lingva Komitato ne estas sufiĉe progresema kaj ne kuraĝas alpreni firmajn decidojn por enkonduki en la lingvon la deziratajn plibonigojn. Sciigante lin pri la ricevo de lia eksiĝo kaj esprimante al li la bedaŭrojn, kiujn kaŭzas al ni lia decido, mi diris al li, ke la Lingva Komitato, laŭ la deklaro farita antaŭ la kongreso de Dresden, devas esti tre prudenta kaj singardema, kaj ke, se ĝi estas preta por oficialigi ĉiun novaĵon, kiun la praktiko montris bona, ĝi tute ne povas trudi al la publiko ne eksperimentitajn novaĵojn.

Vi scias, ke la artikolo 4-a de la Regularo de nia Komitato permesas, ke oni rigardu kiel eksiĝintan, ĉiun Lingvokomitatanon, kiu restis pli ol ses monatoj, ne respondante al la demandoj aŭ leteroj al li adresitaj. Ĉar bedaŭrinde, kelkaj malmultaj kolegoj neniam donas signon de vivo, mi devos proponi tiun eksigon al la Akademio.

Tiu Regulo estis, dum tiu jaro, iom plilongigita, tial ke oni aldonis, ke ankaŭ estos rigardataj kiel eksiĝintaj la anoj, kiuj publike kontraŭbatalas Esperanton. Ni ne ankoraŭ aplikis tiun ĵusaprobitan

BIBLIOTECA FOCE
SARTORIO GENOVA

regulon, sed kelkaj personoj kredis, ke tiu regulo signifas, ke la Akademio ekzigos ĉiun Komitatanon, kiu ne havas la tutesaman opinion kiel la plimulto el la anoj pri la labormetodo de la Komitato kaj la evolucio de nia lingvo. Tiu komprenmaniero ne esta ĝusta. Mi opinias, ke, en nia komitato povas troviĝi, kiel en la parlamentaj anaroj, diversopiniaj partietoj, de la plej konservema ĝis la plej radikala sed kondiĉe ke ĉiuj anoj konfidu al la Komitato por la realigo de siaj deziroj, akceptu kunlabori kun ĝi en tiu celo kaj uzi nur la regulan vojon. Ni ne konservos en niaj vicoj personojn, kiuj ekstere de nia Komitato batalas kontraŭ ĝi kaj kontraŭ Esperanto kaj favoras malkonsenton inter ni, kaj skismon danĝeran, por nia lingvo, kies tuta vivo estas bazita sur nia unueco.

Vi scias ankaŭ, ke la Lingva Komitato, en Barcelono, decidis elekti tri novajn akademianojn, kaj inter ili, unu amerikanon. Ĉar la Esperantista Asocio de Norda Ameriko esprimis la deziron ke la elekto de amerika samideano estu prokrastita, oni proponis nur la elekton de du novaj akademianoj. Estis kandidatoj S-roj Christaller, Höveler, Inglada kaj de Lengyel. S-roj Lengyel kaj Inglada estis elektitaj kaj mi esprimas al ili nian gratulon kaj bonvenan saluton.

Laŭ la regularo, ni devis ankaŭ elekti pluajn anojn en la Lingva Komitato. La numero de julio de *Oficiala Gazeto* sciigis vin pri la elektitaj personoj, al kiuj mi esprimas ankaŭ niajn gratulojn kaj bonvenajn salutojn.

Pri tiu lasta elekto, kelkaj personoj esprimis la opiniojn, ke la nombro de la Lingvokomitatanoj estas tro granda, ke la kandidato ne devus havi la rajton proponi sin mem, sed ke ili devus esti proponataj nur de gravaj naciaj societoj aŭ de societoj de specialistoj, ke la novaj Lingvokomitatanoj ne devus esti elektitaj de la malnovaj anoj sed de la tuta esperantistaro, ke oni elektas personojn, kiujn oni ne konas k.t.p. Oni povas respondi al tiuj rimarkoj, ke la kandidatproponoj estas unue esploataj de la Akademio, kiu faras unuan elektadon, konservas nur la plej indajn, kaj ke poste, ĉiuj titoloj de la kandidatoj estas publikigitaj en *Oficiala Gazeto*, kie ĉiu Lingvokomitatano povas ilin legi kaj tiel havi precizan opinion pri la lingva valoro de la kandidatoj. Kaj mi ankaŭ povas diri, ke, la regularo de nia Lingva Komitato ne estas netuŝebla, kaj ke oni ĉiumomente estas preta esplori ŝanĝproponojn kaj ilin prezenti al la aprobo de la Komitato.

Nun, Estimataj Samideanoj, mi finis tiun longan raporton. Mi havas la fortan esperon, ke, aŭdinte ĝin, vi opinios, kiel mi, ke la Lingva

Komitato laboradis, laŭ la ĝusta vojo, por la vivado de nia lingvo, kaj ke ĝi meritas konservi la tutan konfidon de la Esperantistoj.

E. Boirac.

2a ALDONO.

Raporto prezentata de Sinjoro Generalo Sebert, je la nomo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj.

Estimataj Samideanoj,

Mi havas la honoron raporti pri la agado de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, inter la Kvina kaj la Sesa Kongresoj.

Sendo de oficialaj protokoloj.

La Konstanta Komitato preparigis la Oficialan Protokolaro pri la Kvina Kongreso kaj sendigis ĝin senpage al ĉiuj anoj de tiu Kongreso. Ĝi ankaŭ sendigis al ĉiuj anoj de la Kvara Kongreso, aldonon al la Protokolaro de tiu lasta Kongreso, aldonon kiu enhavas protokolojn forgesitajn pri tri kunsidoj de specialistaj societoj.

Kontoj de la Kvara Kongreso.

Ni publikigis en *Oficiala Gazeto* la kontojn pri la Kvara Kongreso [Vidu O.G. 5(16)]. Ili estas aprobitaj de la kuratoroj de la Kongreso Kaso, kaj la profito de tiu Kongreso, 405, 33 frankoj estis dividata en tri partoj, unu por la germanaj asocioj, unu por la Kongresa Kaso, kaj unu por repago de antaŭaj deficitoj. Post tiuj operacioj, la Kongresa Kaso enhavis krediton de 2259,64 frankoj.

Organizo de la Sesa Kongreso.

Kiel mi agis por la antaŭaj kongresoj, mi sendis al la francaj kompanioj de fervojoj, petojn por konsenti, al la anoj de la Sesa

Kongreso, kiuj traveturos Francujon, rabaton el la prezo de la vojaĝo sur la francaj fervojoj. Sed, por la unua fojo, la francaj kompanioj rifuzis konsenti tiun kutiman rabaton, dirante, ke ili estas jam konsentintaj, dum tiu sama jaro, similajn favorojn por aliaj esperantistaj kongresoj.

Mi esperas, ke ni povos atingi pli favoran rezultaton, proksiman jaron, okaze de la Sepa Kongreso, en Antverpeno.

Tamen, mi sukcesis, ke la franca Kompanio « Transatlantique » konsentu ian favoron por la kongresanoj, kiuj uzos ĝiajn ŝipojn, por iri ĉi tiun jaron, al la Sesa.

Samtempe, la Loka Komitato de tiu lasta Kongreso ankaŭ sukcesis ricevi favorajn kondiĉojn por la vojaĝo sur la amerikaj fervojoj.

Sendo de oficialaj delegitoj al la Sesa Kongreso.

Per siaj ambasadoroj kaj reprezentantoj en ĉiuj landoj, la Usona Registaro transsendis inviton, faritan je la nomo de la Loka Organiza Komitato de Washington, petante ke la diversaj regnoj sendu oficialajn delegitojn al la Sesa Kongreso.

Kiam mi estis informata pri tio, mi sendis al la prezidantoj de ĉiuj grandaj naciaj asocioj, cirkulerojn kun specialaj klarigoj kaj diversaj dokumentoj, por faciligi al ili la necesajn klopodojn, apud iliaj respektivaj registaroj, en la celo apogi la peton de la Loka Komitato kaj ricevi jesan respondon. Samtempe, mi mem agis tiamaniere apud la francaj ministroj kaj vi estos informataj, dum la Kongreso pri la rezultato de tiuj diversaj klopodoj.

Internacia Konsilantaro.

Laŭ deziro esprimata de la Kvina Kongreso, mi devis min okupi pri la starigo de la unua Internacia Konsilantaro, difinita por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj, Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj.

Unue, mi sendis cirkuleron al la prezidantoj de ĉiuj grandaj naciaj societoj, petante ke ili sendu al mi etaton kiu montrus la nombron da esperantistaj grupoj de propagando, ekzistantaj en ĉiu lando, kaj por ĉiu grupo, la nombron de la anoj. Por havi fiksan bazon por la kalkulado, mi proponis, ke oni kalkulu nur la anojn, kiuj estas pagintaj sian grupan kotizon, por la jaro, je la 1ª de oktobro. Kiam en nacio

ekzistis du konkurantaj naciaj societoj, mi sendis la cirkuleron al ambaŭ.

De preskaŭ ĉiuj landoj, mi ricevis la petitajn sciigojn.

Poste, en ĉiu lando, mi min turnis, ĉu al la nacia societo, kiam ekzistas nur unu, ĉu al la plej malnova el la naciaj societoj, kiam mi povis, ĉu al ĉiuj societoj, kiam ekzistas pluraj konkurantaj, inter kiuj mi ne povis fari elekton, petante ke ili interkonsentu kun ĉiuj propagandaj societoj de la lando por elekti la anojn de la Internacia Konsilantaro. Laŭ la deziro de la Kvina Kongreso, estis elektota unu konsilanto por mil anoj de la propagandaj societoj. Ĉiufoje kiam en lando troviĝis mil kaj frakcio, kiam tiu frakcio estis pli granda ol 500, mi proponis ke oni elektu unu konsilanton plie. Por la landoj, kiuj havas malpli ol 500 anojn, mi tamen proponis la elekton de unu konsilanto, opiniante ke tiu unua Konsilantaro estos provizora, kaj ke ĝi mem decidos poste pri sia detala materia organizo kaj pri la elekto de la konsilantoj en la malgrandaj landoj.

Ĝis nun, Aŭstrio, Belgujo, Brazilujo, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Rusujo, Svisujo, kaj Usono elektis siajn reprezentantojn, kaj la ceteraj landoj ĝis nun ne sciigis min pri tiu elekto.

Nun, la Konstanta Komitato de la Kongresoj, konsideras, ke ĝia tasko, en la starigado de la Internacia Konsilantaro, estas preskaŭ finita. Ĝi nun ricevos la nomojn de la novaj konsilantoj, ne ankoraŭ elektitaj kaj publikigos ilin, sed ĝi lasas, al la Konsilantaro, la zorgon entrepreni sian organizadon kaj organizi sian funkciadon. Tamen, por helpi tiun laborkomencadon, mi opinias, ke la Kongreso de Washington povus esprimi kelkajn dezirojn, kiuj donus al mi la eblon helpadi la Konsilantaron en ĝiaj unuaj paŝoj.

Jen tiuj proponataj deziresprimoj :

Unue, ni proponas, ke la *Kongreso de Washington esprimu la deziron, ke la landoj, kiuj, ĝis nun, ne ankoraŭ sendis la nomojn de siaj delegitoj, faru tion kiel eble plej frue.* Tre utile estas, ke la Konsilantaro estu kiel eble plej ĝusta reprezentado de la tuta esperantistaro, kaj ne nur de parto de ĝi.

Tamen, por ke la laborado de tiu Konsilantaro ne estu senfine prokrastata, ni proponas, ke la Kongreso esprimu la deziron, *ke la konsilantoj nun elektitaj tuj komencu sian laboradon kaj konsideru sin kiel unua rajtigita kerno de la Internacia Konsilantaro.*

Mi ankaŭ proponas, ke la Kongreso esprimu la deziron, ke la *Inter-*

nacia Konsilantaro uzu la peron de Oficiala Gazeto, por publikigi ĉiujn siajn laborojn, dokumentojn kaj komunikojn.

Vi scias, ke *Oficiala Gazeto* estis kreita por anstataŭi la multajn cirkulerojn sendotajn de niaj oficialaj institucioj, kaj kies sendo kostas multe da mono kaj uzas grandan tempon. Por ke *Oficiala Gazeto* povu efike ludi tiun rolon, estas nepre necesa, ke la diversaj propagandaj grupoj kaj societoj abonu ĝin. La abono al *Oficiala Gazeto* estas cetere, unu el la plej simplaj, kaj tre bona rimedo por subteni finance la oficialajn instituciojn de Esperanto. Malgraŭ la diversaj alvokoj faritaj diversepoke pri tio, malgraŭ la sendado de la numero 8 (19) al ĉiuj societoj kaj grupoj en la mondo, kun speciala alvoko kaj abonilo, la nombro de la abonantoj al tiu *Gazeto* kaj speciale la nombro de la abonintaj grupoj estas tro malgranda kaj tute ne sufiĉa por vivigi normale tiun Gazeton kaj ebligi, ke ĝi ludu sian rolon de oficiala ĝenerala informilo por la tuta esperantistaro. Pro tio, mi proponas, ke al la deziro supre esprimita ke la Internacia Konsilantaro alprenu la *Oficialan Gazeton*, kiel oficialan organon, la Kongreso aldonu la jenan deziron :

La Kongreso memorigas al ĉiuj societoj kaj grupoj, ke la abono al Oficiala Gazeto estas unu el la plej bonaj rimedoj por helpi finance la oficialajn instituciojn de Esperanto kaj por esti regule informata pri iliaj laboroj.

Fine, oni povas rimarki, ke la gazetaj artikoloj ĉiam repetas esploron de la demando pri reprezentantaro kaj akordiĝo inter la naciaj societoj. Nek la Konstanta Komitato de la Kongresoj, nek la Universalaj kongresoj, en sia nuna formo, havas rajton formale decidi pri tiu afero. Ju pli disvatiĝas nia lingvo, des pli grandaj fariĝas niaj kongresoj, kiuj estas komunaj festoj, grupigantaj, en celo de propagando kaj reciproka amuziĝo, malgrandan kaj nesufiĉan parton de la esperantistaro.

Cetere, laŭ la Kongresa Regularo, oni akceptas, en laboraj kunsidoj, ĉiun esperantiston, kaj oni ne donas specialajn rajtojn, en la diskutoj kaj decidoj, al la delegitoj de la grupoj kaj societoj.

Sekve, pli kaj pli fariĝas necesa, ke la gravaj demandoj de ĝenerala intereso por la diverslandaj propagandaj asociaj estu zorge kaj efike esploratai en kunsidoj de rajtigitaj delegitoj de tiuj asocioj mem.

Ĝis kiam tiaj kunvenoj estos eblaj, mi proponas, ke la Kongreso esprimu la opinion, *ke estas necese, ke la Internacia Konsilantaro prenu sur sin la taskon faciligi amikajn rilatojn inter la propagandaj asocioj, por komunaj propagandaj celoj.*

Sidejo de la proksimaj kongresoj.

Vi scias, ke la Kongreso de Barcelono decidis, ke la Sepa Kongreso okazos en Antverpeno, en 1911, kaj ĝi notis, por la proksimaj jaroj, la proponojn por okazigi la sekvontajn kongresojn en Munchen, Graz, Praha, Wien, Krakovio.

De tiu epoko, ni ricevis novajn proponojn, nome de la Unua Kunveno de la Italaj Esperantistoj, por ke okazu kongreso en Italujo, dum 1913, kaj de la Unua Kongreso de la Rusaj Esperantistoj, por ke la Kongreso de 1912 havu lokon en Rusujo. Fine, ni ricevis lastamomente invitojn por okazigi la kongreson de 1915 en New-Orleans, kie estos, dum tiu jaro, granda amerika Ekspozicio.

Ĉar en tiu ĉi Sesa Kongreso, la eŭropaj samideanoj estas malmultaj kaj, ĉar la demando interesas precipe ilin, mi proponas, ke oni prokrastu ĉiun decidon pri tiu afero ĝis kiam la Konstanta Komitato estos studinta tiujn diversajn proponojn.

3ª ALDONO.

Kongresa Decidaro.

SALUTAJ TELEGRAMOJ.

La Sesa Kongreso decidas sendi salutajn telegramojn al Prezidanto Taft, al S-ro Roosevelt kaj al S-roj Sebert kaj Boirac.

PROPAGANDO ĈE LA INTERPARLAMENTA KUNVENO DE 1913.

La Sesa Kongreso dankas S-ron Prezidanton de la Aga Komitato de la Universala Ekspozicio de New-York (1913) *pro liaj interesaj sugestioj pri propagando de Esperanto ĉe la Interparlamenta Kunveno, kiu okazos en tiu Ekspozicio.*

KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ.

La Sesa Kongreso dankas la Konstantan Komitaton de la Kongresoj kaj ĝian prezidanton, Generalon Sebert, pro la interesa raporto pri la agado de la Komitato inter la Kvina kaj la Sesa Kongreso.

Oficiala Gazeto.

La Sesa Kongreso memorigas al ĉiuj societoj kaj grupoj, ke la abono al la Oficiala Gazeto estas unu el la plej bonaj rimedoj por helpi finance la oficialajn instituciojn de Esperanto, kaj por esti regule informata pri iliaj laboroj.

Internacia Konsilantaro.

La Sesa Kongreso esprimas la deziron, ke la landoj, kiuj ĝis nun ne ankoraŭ sendis la nomojn de siaj delegitoj, faru tion kiel eble plej frue.

La Sesa Kongreso esprimas la deziron, ke la konsilantoj nun elektitaj tuj komencu sian laboradon, kaj konsideru sin kiel unua rajtigita kerno de la Internacia Konsilantaro.

La Sesa Kongreso esprimas la deziron, ke la Internacia Konsilantaro uzu la peron de Oficiala Gazeto por publikigi ĉiujn siajn laborojn, dokumentojn kaj komunikojn.

La Sesa Kongreso esprimas la opinion, ke estas necese, ke la Internacia Konsilantaro prenu sur sin la taskon faciligi amikajn rilatojn inter la propagandaj societoj por komunaj propagandaj celoj.

Lingva Komitato.

La Sesa Kongreso dankas S-ron Boirac pro lia raporto pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj Akademio inter la Kvina kaj la Sesa Kongresoj, kaj esprimas sian tutan konfidon al tiuj institucioj.

Sidejo de la Proksimaj Kongresoj.

La Sesa Kongreso notas, por la postaj jaroj, la invitojn aŭ proponojn okazigi la kongreson de 1912 en Rusujo aŭ en Krakovio; la kongreson de 1913 en Italujo; la kongreson de 1914 en Paris; kaj la kongreson de 1915 en New Orleans aŭ San Francisco; kaj dankas la personojn, kiuj faris tiujn invitojn aŭ proponojn.

Propono de la Holanda Societo Esperantista.

La Sesa Kongreso resendas, por esploro de la Lingva Komitato la proponon de la Holanda Societo pri elekto de Lingvo-komitatanoj.

Propono de S-roj Twombly kaj Scott.

La Kongreso decidas, unue: ke, ĉar S-ro Schleyer ĉiam havis estimon de la Esperantistoj, ne estas sufiĉa preteksto por ĝin esprimi hodiaŭ speciale; due, ke ne konvenas nomi la Sesan Kongreson la Naŭa Internacia.

Rezolucio de la Usona Kongreso pri Paco.

La Sesa Kongreso aŭdis, kun plezuro, ke la Usona Kongreso ĵus adoptis rezulucion, ke la prezidanto nomu internacian komision de kvin personoj rilate al universala paco, kaj ke tiu rezolucio devenis de la Ligo por Monda Federacio de New-York, kiu antaŭenpuŝis ĝin ĝis sukceso.

Diversaj Dankoj.

La Sesa Kongreso dankas:

Ges-rojn Zamenhof pro ilia veno en Amerikon.

La Usonan Registaron, kiu sendis la oficialajn invitojn al la diversaj registaroj, por ke ili estu reprezentataj.

La registarojn, kiuj sendis oficialajn delegitojn al la Kongreso.

S-ron John Barrett, prezidanton de la Kongreso, kiu multe helpis la sukceson de la Kongreso en oficialaj rondoj.

uzo de jam akceptitaj vortoj ol per la enkonduko de novaj radikoj por aŭ naciaj aŭ kvazaŭslangaj vortoj.

Aliflanke ni petas, ke la Lingva Komitato atente prizorgu la vortojn necesajn, por ke ni havu plenan vortaron por la esprimado de ĉiu ideo, kiu rilatas la poŝton.

Lisle Terwilleger. U. S. R. M. S.
Amy C. Leavitt. U. S. P. O. Dept.
Cleora Churchill. U. S. P. O. Hallowell, Maine.
Edward L. Southwick, Letter carrier. Pawtucket. R. I.. U. S. A.
Peter H. Petersen, formerly Asst. P. M., Plainview, Nebr.

Scienca Asocio.

La unua kunsido de Internacia Scienca Asocio okazis en *Washington*, Mardon 16-an de Aŭgusto, je la 11-a matene, en ĉambro de la Universitato de *Georgetown*.

Inter la ĉeestantoj estis: S^oj John C. Bley (*Chicago*), H. Briggs (*Minneapolis*); C. Cooper (*Oregon*), Cotton (*Paris*), Norman Hastings (*Boston*), Roger P. Heller (*Bethleem*), B. Howard (*New-York*), F. H. Loud (*Colorado*), Rollet de l'Isle (*Paris*). Spillman (*Washington*), k. t. p.

Oni elektis, kiel prezidanton, S^on Spillman, de la Agrikultura Ministrejo de *Washington*, kiu, post kelkaj vortoj per kiuj li esprimas bonvenon al la ĉeestantoj, donas la parolon al S^ro Rollet de l'Isle.

Tiu ĉi klarigas la celon de la Internacia Scienca Asocio, t. e. la enkondukon kaj disvastiĝadon de Esperanto en la sciencajn kaj teknikajn fakojn. Li resumas la metodojn uzitajn por atingi tiun celon kaj la rezultatojn jam ricevitajn. Speciale li atentigas la ĉeestantojn al la grava temo de la teknikaj vortaroj kaj al la funkciado de la Asocio je tiu vidpunkto; li memorigas la organizadon faritan dum la Kongreso de Barcelono de la Scienca kaj Teknika Komisio kaj de la Sekcio de la Akademio, kiuj devas okupiĝi pri tiu temo. Fine li legas Raporton (vidu tie-ĉi sube) pri la funkciado de tiu komisio dum la lasta jaro.

S^ro Cotton, poste, legas noton pri la Scienca Revuo kaj la granda intereso, kiun prezentas tiu ĵurnalo pri la propagando (Vidu tie-ĉi sube).

Post tiuj paroladoj kaj legadoj, S^ro^ Rollet de l'Isle proponas al la ĉeestantoj tuj aliĝi al la Societo aŭ aboni al la Scienca Revuo, kaj granda nombro da tiuj ĉeestantoj enskribas sin sur la listojn, kiujn oni rondirigas.

S^ro^ Spillman legas noton en kiu li montras la necesecon havi, plej baldaŭ kiel eble, interkomprenilon inter la sciencistoj por ŝpari la tempon de la elserĉistoj kaj antaŭenpuŝi, per scienca kunlaborado, la diversajn demandojn nun studotajn. Li rimarkigas ke, inter tiuj-ĉi sciencistoj, la biologiistoj estas speciale multenombraj; estus sekve dezirinde, ke Internacia Scienca Asocio starigu specialan ĵurnalon, pri biologio, tute redaktitan esperante: li ne dubas, ke la Esperantistaro bonvolos ĝin subteni, ĝis ĝi fariĝos memstaranta. S^ro^ Spillman aldonas, ke alia grava maniero por trudi Esperanton al la sciencistoj estus traduki famajn sciencajn verkojn, kaj li sciigas, ke antaŭ kelkaj monatoj, li ricevis proponon pri tio de D^o^ H. J. Webber, de la Agrikultura fako de la *Cornill* Universitato en *Ithaca*, N. Y. Tiu Sinjoro proponis, ke la I. S. A. anoncu, ke ĝi ricevos ofermonon por traduko de gravaj sciencaj vortoj, kaj li promesis personan kotizaĵon de 1.000 dolaroj.

S^ro^ Rollet de l'Isle rimarkigas, ke efektive tiu metodo estus certe efika, speciale se la tradukota verko estas farata de fama scienculo kaj ne ankoraŭ publikigita en iu nacia lingvo; kaj li intencas atentigi la estraron de Internacia Scienca Asocio pri tiu grava propono. Rilate al speciala ĵurnalo, la malfacileco estas, ke unuflanke oni devas interesigi eldoniston, kiu eble respondos, ke li estas preta por fari eldonon esperantan, nur se oni povus certigi, ke li ricevos sufiĉe grandan nombron da abonoj; kaj aliflanke oni trovas scienculojn, kiuj intencas lerni Esperanton nur kiam ili estos certaj, ke ili ricevos publikigaĵojn en tiu lingvo. Plej bona maniero por solvi la problemon ŝajnas esti, ke oni kolektu nomojn de personoj aprobantaj la ideon de esperantaj sciencaj ĵurnaloj aŭ revuoj, eĉ promesantaj aboni, kaj kiam oni havos sufiĉe gravan nomaron, oni povos certigi al iu eldonisto, ke li trovos sufiĉan nombron da abonantoj. Oni do, de nun, povus komenci kolekti en ĉiuj landoj, en la sciencaj aŭ teknikaj fakoj, tian nomaron. Aprobante tiujn ideojn, la ĉeestantoj tuj enskribas sin kiel promesantaj abonantoj kaj ili certigas, ke en malgranda tempo ili povos kolekti pli ol mil nomojn en Ameriko. S^ro^ Spillman, kiu bonvolas akcepti la titolon de Delegito de Internacia Scienca Asocio en Washington, kolektos tiujn nomojn kaj sendos ilin al la ĝenerala sekretario de la Asocio.

Sro Rollet de l'Isle donas ankoraŭ klarigojn pri la funkciado de la «*Kongresa Sekcio*». Sed ĉar ne restis sufiĉe da tempo, oni ne povis legi la raporton pri tiu sekcio (oni trovos ĝin pli sube), kaj ĉar kelkaj ĉeestantoj deziras ankoraŭ ricevi sciigojn pri la Esperanta movado en la sciencaj fakoj de Eŭropo, oni decidas, ke okazos dua kunsido, la venontan jaŭdon, je la 11-a matene, en la sama ĉambro.

Tiu dua kunsido estis ankoraŭ prezidata de Sro Spillman. Sro Rollet de l'Isle respondas al diversaj demandoj, adresataj de la ĉeestantoj pri kelkaj punktoj rilataj al la organizado kaj laboroj jam faritaj de Internacia Scienca Asocio.

Poste, Sro Spillman donas tre interesajn klarigojn pri la pronuncmaniero de la esperantaj literoj *ĥ*, *h* kaj *k*, kaj de la hispana *g*. Li montras la formojn, kiujn devas havi la diversaj organoj de la buŝo kaj de la laringo por taŭge pronunci tiujn sonojn.

Fine, diskutado okazas inter Sro Spillman kaj Hagues pri speciala vermo, kiun oni nomas angle *Hook worm*.

En mallonga parolado Sro Spillman deziras baldaŭan revidon al la ĉeestantoj, kaj instigas ilin multe kaj vigle labori por Esperanto, kiu tiel mirinde jam disvastiĝis en Europo kaj certe, plej baldaŭ kiel eble, donos nekalkuleblajn profitojn al ĉiuj scienculoj de la Mondo.

1a *Aldono*.

Raporto pri la Kongresa Sekcio de la Internacia Scienca Asocio.

Estas evidenta, ke, kiam oni deziras proponi al iu persono la alprenon de nova ilo, la plej bona momento por tion fari estas tiam, kiam tiu persono akre sentas la bezonon de tiu ilo.

Preskaŭ nenie pli certe ol en la Internaciaj Kongresoj oni sentas la bezonon de internacia lingvo. En tiuj kunsidoj, kies ĉefa celo estas interrilatigi specialistojn de sama fako por diskuti la plej gravajn teknikajn problemojn, oni ĉiam konstatas tutan neeblecon de inter kompreniĝo. Ĉiam la ĉeestantoj bedaŭras, ke la rezultatoj ricevitaj de tiuj renkontoj de eminentuloj estas, por tiel diri, nekonsiderindaj rilate al tiuj, kiujn oni atingus se ĝenerala diskutado povus okazi.

Estas sekve en tiuj momentoj, ke la propono pri alpreno de nia lingvo havas plej gravajn ŝancojn por sukcesi.

Jam de longe la Esperantistoj intencis tion fari, sed, ĝis antaŭ

kelkaj jaroj, nia lingvo estis tro malmulte disvastigata por permesi, ke la provoj farotaj laŭ tiu direkto atingu seriozan rezultaton.

Nun la cirkonstancoj ŝanĝis, ĉar la nomo Esperanto estas ĉie konata, kaj la eminentaj personoj de ĉiuj specialaj fakoj, sciencaj, komercaj kaj aliaj, kiuj patronas la klopodojn de ĝiaj propagandistoj, estas sufiĉe multenombraj por ke oni povu esti certa, ke la demando ne estos senresponde forigita, kiam oni prezentos ĝin.

Tion komprenis la Internacia Scienca Asocio, kaj ĝi organizis inter siaj membroj specialan sekcion komisiitan por agi en la internaciaj sciencaj kongresoj.

La vojo estas de nun malfermata per rezultatoj, sur kiuj oni povas apogi sin, ĉar jam multenombraj internaciaj kongresoj interesiĝis pri Esperanto.

La Kongresa Sekcio estis organizata tuj post la Kongreso de Barcelono, kaj ĝi komencis laboradi sub la direkto de Generalo *Sebert*. Rimarkinda okazo de agado tuj prezentiĝis. En la Universala Ekspozicio de Bruselo, speciala Grupo de internaciaj kongresoj estas organizata kaj la unua kongreso estis Tutmonda Kongreso de la Internaciaj Asocioj.

Estis tre grava, ke en tiu kongreso, al kiu devis partopreni homoj speciale okupataj pri la internaciaj aferoj kaj kiuj sekve, pli ol iuj ajn, devis senti la malprofitojn kaŭzatajn de la diverseco de la naciaj lingvoj — estis tre grava, ke oni montru Esperanton, kiel la solvo de tiu situacio, solvo ne en la projekto, sed jam de longe uzata kaj kiun oni povas alpreni, ne timante ĝian netaŭgecon. Dank' al la klopodo de la ĉeestantaj esperantistoj, tiu rezultato estis atingata. Se tiu kongreso ne oficiale konkludis pri la alpreno de Esperanto, tamen la ĝenerala impreso de ĉiuj ĉeestantoj estis, ke tiu lingvo prezentas la necesajn ecojn, ke ĝi estas tute preta por ludi tiun gravan rolon, kaj oni povas esperi, ke la rezultatoj de tiu impreso baldaŭ montriĝos.

Esperanta Oficejo estas ankoraŭ nun starigata en Bruselo por traduki en Esperanto la dokumentojn de la diversaj kongresoj, kiuj tion eble deziras, kaj ĝi preparas esperantajn aldonojn al la Revuo de la Kongresoj, kiu estas publikigata dum la tuta daŭro de l'Ekspozicio; tiamaniere tiu Revuo entenas du partojn, unu en la franca lingvo kaj unu en Esperanto.

La Kongresa Sekcio ankaŭ preparis kelkajn cirkulerojn difinitajn por ebligi ĝian agadon en la estontaj kongresoj. Estas necese, efektive, ke tiu agado estu laŭsistema kaj ke en ĉiu okazo oni laboru kun plena sciigo de la situacio.

Unue, oni devas prezenti Esperanton al la organizantoj de Kongreso, postulante la akcepton de ĝi inter la lingvoj uzotaj dum la kunsidoj, tio estas kiel vivanta lingvo, kiun kelkaj kongresantoj povas uzi, kaj sekve kies uzo devas esti permesata. Samtempe oni montros, ke tiu lingvo estas perfekta interkomprenilo, kiun ĉiuj, kiuj tion deziras, povas rapide akiri por interrilatiĝi kun alilanduloj.

Pli grava rezultato povas ankaŭ esti atingata, se sufiĉa nombro da Esperantistoj ĉeestas la kongreson. Tiam oni povas organizi esperantistan sekcion en kiu ili kunvenos, legos komunikaĵojn kaj diskutados. Tio estas nekomparebla propagandilo, ĉar la kongresistoj neesperantistaj, post kiam ili ĉeestos ordinarajn kunsidojn, en kiuj ili konstatis la bedaŭrindan nekompreniĝon de la ĉeestantoj, kaj la esperantajn kunsidojn, en kiuj ili vidos ĉiujn diverslingvanojn perfekte interkompreniĝantajn, certe estos konvikataj pri la grandegaj profitoj, kiujn alportas Esperanto.

Estas do necesa, ke la Esperantistoj partoprenu plej ofte kiel eble la internaciajn kongresojn. La Kongresa Sekcio interrilatigos ilin, klopodos por helpi ilin en la organizado de Esperantista Sekcio en ĉiu kongreso, aŭ de oficejo de traduko apud la oficejo de organizado de la kongreso. Do nia Sekcio bezonas la kunlaboradon de ĉiuj Esperantistoj kaj ankaŭ de la Esperantista gazetaro, kiu povas multe helpi la aferon, sciigante pri la okazontaj internaciaj kongresoj kaj pri ilia situacio rilate al Esperanto.

2ª *Aldono.*

Raporto pri la Laboroj de la Scienca kaj teknika Komisio de la internacia Scienca Esperantista Asocio.

Dum la Kongreso de Barcelono, la Scienca Asocio decidis starigi teknikan kaj sciencan komision por proponi teknikajn vortarojn kaj doni al la specialistoj konsilojn kaj regulojn por elekti la vortojn, kiujn ili bezonas, plej racie, unuforme kaj internacie. S-ro *Rollet de l'Isle* estis samtempe komisiita kiel Direktoro de tiu komisio.

Ĝi estis organizita tuj de la komenco de la monato de Oktobro:

akceptante la proponon al ili faritan de la Direktoro, la sekvantaj personoj bonvolis fariĝi membroj de ĝi :

S^oj *Bricard*, Profesoro ĉe la Konservatorio de la Artoj kaj Metioj, Membro de la Lingva Komitato, aŭtoro de la Matematika Terminaro ;

Cotton, Profesoro de Fiziko ĉe la Scienca Pariza Fakultato ;

Grosjean-Maupin, Membro de la Lingva Komitato, aŭtoro de kelkaj lernolibroj kaj vortaroj esperantaj ;

Hoffbauer, Profesoro de Matematikoj, Membro de la Lingva Komitato, aŭtoro de la unua Matematika Vortaro ;

Mouton, Estro de laborejo en la *Pasteur'* a Instituto de Parizo ;

Verax, Membro de la Lingva Komitato, aŭtoro de la Enciklopedia Teknika Vortareto kaj de la Teknika Vortaro.

Ŝajnis logike al la komisio unue starigi la konsilojn donotajn al la specialistoj : tiuj konsiloj estas pravigataj per la ekzemplo de la Puraj Sciencoj, kiujn oni starigus poste.

Sekve la komisio komencis ĝian laboradon pri la unua temo. La labormetodo estis la sekvanta : la diversaj ekzamenotaj punktoj, preparitaj de la Direktoro, estis diskutataj en la kunsidoj : poste teksto estis redaktata de la Direktoro, prezentata al la ekzameno de ĉiuj membroj kaj fine korektata laŭ iliaj rimarkoj. Ankaŭ tiu teksto estas *parte* ekzamenata de la korespondantaj membroj de la komisio, kiuj estas S^oj *C.-W. Barlow* (Anglujo), *Eberlé* (Germanujo) kaj *Meazzini* (Italujo).

En la monato de Majo, post ĉirkaŭ dudek kunsidoj, la verko estis finita kaj sendita por publikigado al S-ro *Thalwitzer*, ĉefredaktoro de la Scienca Revuo. Post kiam ĉiuj rimarkoj de la sciencistaj esperantistoj, kiuj tion bonvolos studi, estos ricevitaj, tiuj konsiloj estos fine publikigataj post korekto kaj estos rigardataj kiel oficialaj ideoj de la Scienca Asocio pri la metodoj sekvotaj por verki la novajn teknikajn kaj sciencajn esprimojn.

Certe neniu estas devigata obei ilin, sed ni opinias, ke ĉiuj esperantistoj pripensos, antaŭ starigi aliajn regulojn, ke estas tre grava

por nia afero, ke la teknikaj kaj sciencaj esprimoj prezentu iun unuformecon, kaj por atingi tiun unuformecon, estas pli bone forigi personajn preferojn kaj agi laŭ la ideoj akceptitaj de la plimulto de la kompetentuloj. Kiel por la komuna lingvo, tiu akordo ne trudos al la lingvo difinitan senmovecon, sed ĝia movo, anstataŭ esti direktata laŭ iu ajn direkto, estos direktata laŭ vojo montrita kiel la plej bona per la sperto de la antaŭaj laboroj.

La komisio intencas daŭrigi sian verkon dum la venonta jaro kaj unue starigi — kiel ni anoncis — la vortaron de la « Puraj Sciencoj ». Aliparte, ĝi jam estas komencita kaj ni starigis la nomenklaturon de la neorganika ĥemio ; poste ni starigos la fundamentajn nomenklaturojn de la aliaj sciencoj ; kaj la vortarojn de Astronomio, Fiziko, Ĥemio, Geologio, k. t. p.

Ni ne intencas en tiuj vortaroj entenigi ĉiujn vortojn, kiujn oni uzas en tiuj sciencoj, sed nur starigi la ĉefajn esprimojn, kiuj estas kiel la nomoj de la diversaj ĉapitroj kaj inter kiuj facile lokiĝos la aliaj malpli gravaj terminoj. Tiamaniere la vortaro science kaj logike formiĝos kaj prezentos unuecon kaj similecon.

Post tiu grava laboro, ni ankaŭ intencas doni konsilojn por la materia laborado de la vortaroj ; prezentante la diversajn metodojn jam uzitajn de la aŭtoroj de la vortaroj publikigataj, kaj ankaŭ la formojn, kiujn oni povas alpreni per la publikigado de tiuj vortaroj.

Dum tiu laborado ni — se ni havas sufiĉan tempon — dezirus studi la diversajn artikolojn publikigatajn en revuoj aŭ libroj. Aplikante la principojn difinitajn per la konsiloj, ni penos kritiki tiujn verkojn, montrante al la aŭtoroj (ne tamen malhelpante ilin), kiajn esprimojn ili devas uzi por konservi al la teknika lingvo la ecojn, kiujn ĝi devas posedi. Esperanto — kvankam kelkaj, kiuj ne bone scias ĝin, pretendas la kontraŭon — Esperanto estas lingvo mirinde taŭga por la sciencaj aplikadoj : ĝi estas perfekte preciza, kiam oni scias uzi ĝin ; sed kelkafoje la sciado de la komuna lingvo ne sufiĉas por bone uzi la sciencan lingvon kaj ni montros al la teknikistoj, laŭ kiu metodo oni devas labori por ricevi plej taŭgajn rezultatojn.

Tiu programo estas iom granda kaj postulos eble pli malpli da tempo, sed plenumante ĝin, ni estas certaj, ke ni iros laŭ taŭge difinita vojo, kaj ke ĉiu paŝo, kiun ni antaŭen faros, alproksimigos nin al la celo, kiu estas starigado de teknika kaj scienca esperanta lingvo.

3ª *Aldono.*

Pri la Scienca Revuo.

Ĝis nun nia lingvo ne ankoraŭ estas uzata praktike de la Scienculoj. Multaj el ili tamen publike aprobis nian propagandon, ĉar, kiel ĉiuj homoj, kiuj bezonas interrilatiĝi ofte kun alilanduloj, ili sentas la necesecon de internacia interkomprenilo. En iliaj kongresoj, la diskutadoj estas neeblaj; la ĉefaj verkoj de eminentuloj restas, malgraŭ kelkaj tradukoj, malfacile koneblaj de la samspecialistoj; kiam ili iras en fremdajn landojn por viziti la laborejojn, la observejojn, en kiuj ili devas trovi interesajn dokumentojn, ili estas ĝenerale malhelpataj de la preskaŭ neebleco interkompreniĝi.

Pli kaj pli hodiaŭ Scienco fariĝas internacia: en ĉiuj landoj la serĉoj de la plej grandaj problemoj samtempe efektiviĝas, kaj la sola rimedo por ke tiel granda nombro da laboroj produktu ĝian maksimuman rezultaton estas, ke ĉiuj serĉistoj, en ĉiu momento, sciu kun precizeco, kion faras iliaj najbaroj.

Oni devas vidi en tiu malkontentiga stato de la disvastiĝo de Esperanto en tiuj sciencaj rondoj ne alian motivon ol tiu, kiu ĝenerale kaŭzas malfacilecon de nia agado en la aroj de praktikaj homoj. Plej ofte sorbataj de profundaj laboroj, okupataj per serĉoj tute malsimilaj al la demando de internacia lingvo, ili, kiam oni atentigas ilin pri tiu progreso, komprenas facile ĝian necesecon, sed ne povas ĝenerale doni al ĝia realiĝado alian apogon ol sia platonika aprobo.

Tio ne devas malkuraĝigi nin; kvankvam ili ne efike laboras, tamen ili estas pretaj por profiti la rezultaton de la laboro. Do estas necese nur konduki tiun laboron ĝis la momento, kiam ĝi prezentiĝas kun sufiĉa aspekto de praktikeco, por ke ĉiuj, kiuj bezonas internacian lingvon, povu komenci uzi ĝin, kun certiĝo, ke ĝi havigos ĉiujn profitojn, kiujn oni rajtas postuli de ĝi.

Unu el tiuj profitoj estos la ebleco, kiel ni diris, esti informata ĉiumomente pri la laboro efektivigata en la tuta mondo. Tiu sciiĝo povas esti realigata nur per internacia publikigado. Oni povas facile imagi grandan internacian organizadon, kiu unuflanke konigus al iu specialisto la titolojn de ĉiuj verkoj publikigataj en la diversaj lingvoj pri la temo kiu interesas lin, kaj duaflanke povus havigi al li la tradukon en Esperanto de tiuj verkoj. Bedaŭrinde ni ne povas ankoraŭ organizi tiel grandan aferon, sed ni tamen povas doni kelkajn sciigojn de tiu speco.

Plie, kiam Esperanto estos universale uzata, la nacilingvaj sciencaj revuoj publikigos, apud sia nacilingva eldono, esperantane donon. La ĉefaj verkoj de la eminentuloj estos tuj tradukataj en Esperanto; kaj, per tiu rimedo, disvastigataj en la tuta mondo. Fine specialaj revuoj tute redaktataj en Esperanto donos al la sciencistoj ĝeneralajn sciigojn pri la scienca movado. Nun ne estas eble ankoraŭ efektivigi la du supreditiritajn unuajn organizojn, sed oni povas realigi la lastan. Kaj nia Scienca Revuo jam de ses jaroj realigis ĝin.

Komencata sub la patronado de multaj eminentuloj aŭ sciencaj societoj, la publikigado de nia Scienca Revuo daŭriĝis seninterrompe dum tiuj ses jaroj, precipe dank' al la sindonemeco de ĝiaj ĉefredaktoroj : ili donis al ĝi sian tempon kaj eĉ sian monon, kaj ankoraŭ hodiaŭ la vivado de tiu Revuo estas asekurata per tiu sama rimedo. Sed tio ne sufiĉas : la vivado de la esperantaj kreaĵoj, kiuj ajn ili estas, ne devas ripozi nur sur la individua oferemeco, ĉar povas okazi momento, je kiu tiu oferemeco fariĝas neebla; plie, tiu rimedo montras la malfortecon de nia afero. Kontraŭe, kiam ĉiuj niaj organizaĵoj estos subtenataj per ordinaraj rimedoj, estos prosperaj dank' al la partopreno de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri ili, tiam oni povos diri, ke Esperanto vere triumfas kaj montri al la publiko tiun pruvon de triumfado.

Pro tiuj diversaj motivoj ni devas klopodi por ke nia Scienca Revuo progresu kaj pliboniĝadu. Laŭ la programo, kiun D^ro Thalwitzer celas realigi, tiu Revuo entenos ne nur sciencajn artikolojn redaktitajn tiamaniere, ke ĉiuj homoj, kiuj, ne estante scienculoj, interesiĝas pri la Scienco, povu kompreni ilin kaj sekvi la movadon de la sciencaj progresoj.

Sekve, abonante tiun Revuon, oni samtempe helpas la progresadon de Esperanto en la sciencularo, kaj montras, ke tiu esperanta kreaĵo vivas pro la servoj, kiujn ĝi havigas al ĉiuj esperantistoj.

Universala Esperanto-Asocio

Unua Kunsido (*la* 18-*an de Aŭgusto* 1910)

La kunsido estas malfermita je la 10-a matene, en la Salonego de la Hotelo Arlington, sub la Prezido de Pastro Paul F. Hoffman (Del. Baltimore).

S-ro W. Mann (London) estas elektita kiel Sekretario.

S-ro Schubert (Del. Washington) legas leteron, kiun li ricevis de S-ro H. Hodler, Vic-Prezidanto de U. E. A. En tiu letero, S-ro Hodler donas informojn pri la progreso de la Asocio dum la pasinta jaro kaj sciigas ke la komitato pensas, ke oni devus starigi en Usono Centran Oficejon kun kiu korespondus rekte ĉiuj Delegitoj de Ameriko, kaj kiu estus la centro por tiu Kontinento. Li salutas la Kongreson de Washington je la nomo de la Komitato.

Pastro Hoffman proponas dankojn al S-ro Hodler pro lia saluto kaj atentigas pri la graveco de lia letero. Tiu ĉi kunveno estas la unua de la membroj de U. E. A. en Ameriko kaj ili devas profiti ĝin por interkonsenti pri sia estonta propagando. Li aldonas, ke oni devas klopodi por ke en ĉiu urbo iom grava estu Delegito de la Asocio kaj labori senlace por la sukceso de nia entrepreno en ĉiuj rondoj.

Li transdonas la parolon al S-ro Schubert, por ke li legu la Raporton de la Administra fako de U. E. A.

S-ro G. Warnier (Del. Paris) petas la parolon. Li rimarkigas, ke tiu unua kunveno estas ĝenerala kaj publika. Almenaŭ la duono de la ĉeestantoj, t. e. 150 personoj el 300 — ne estas ankoraŭ membroj de U. E. A. kaj li opinias, ke estus pli bone se oni donus al ili kelkajn klarigojn pri la celo, kresko kaj agado de nia Asocio. La raportojn oni povos legis dum la dua kunsido.

Kolonelo Pollen (London) subtenas tiun proponon, kiu estas unuanima akceptita.

Pastro Hoffman transdonas la parolon al S-ro G. Warnier, kiu montras la praktikan utilecon de U. E. A., ĝian altan signifon por la plibonigo de la rilatoj ĉiuspecaj inter la homoj, ĝian mirindan sukceson kaj finas petante ĉiujn ĉeestantojn, kiuj jam ne aliĝis al U. E. A. sin turni al S-ro Schubert post la fino de la kunsido, por enskribiĝi en nia potenca Asocio.

S-ro Schubert informas la Delegitojn, ke li havas je ilia dispono presitajn raportojn kaj deziresprimojn, kiujn oni diskutos en la dua kunsido.

S-ro Hoffman transdonas la parolon al S-ro Hodges, konata ĵurnalisto el Philadelphia, kiu sprite rakontas, angle, kiel li konvinkiĝis, ke Esperanto estas la ideala lingvo por internaciaj rilatoj (S-ro Hodges poste verkis bonegan artikolon en la *North American*, grava gazeto de Philadelphia).

S-ro W. Mann tradukas lian parolon, kiu estas varme aplaŭdata.

Kolonelo Pollen dankas S-ron H. Hodler kaj la direktantojn de U. E. A. pri la granda kaj fruktodona laboro de ili farita.

La kunveno estas fermita je la 12-a, post kelkaj vortoj de D-ro L.-L. Zamenhof, Honora Prezidanto de la Asocio, kiu salutas la ĉeestantajn Esperantianojn kiel *kamarado* en U. E. A.

Dua Kunsido (la 19-an de Aŭgusto 1910.

La kunsido estas malfermita je la 11-a matene en la Salonego de la Hotelo Arlington, sub la Prezido de Pastro Paul E. Hoffman (Del. Baltimore).

S-ro G. Warnier (Del. Paris) anstataŭas S-ron W. Mann (London) kiel Sekretarion kaj legas la protokolon pri la antaŭa kunsido. Tiu protokolo estas unuanime akceptita.

S-ro G. Warnier informas la ĉeestantojn ke, pro manko de tempo li donos nur resumon de la Raportoj, kiujn la Kongreso de U. E. A. devas ekzameni kaj legos *in extenso* nur la deziresprimojn.

La deziresprimo pri Raporto 1 estas unuanime akceptita.
La deziresprimo pri Raporto 2 estas unuanime akceptita.
La deziresprimo pri Raporto 3 estas unuanime akceptita.

Pri la Raporto 4, S-ro G. Warnier diras ke, laŭ lia opinio, oni ne povas eksigi Delegiton, kiu ne varbis dudek membrojn, ĉar evidente estas ke Delegiton, kiu varbos 30 membrojn en urbo de cent mil loĝantoj faros malpli da laboro ol Delegito, kiu varbos 15 en urbo de 3000 loĝantoj, kaj ne estus juste eksigi la duan kaj gardi la unuan.

S-roj Christen kaj Roodie parolas por la propono. S-ro Christen diras, ke oni povus fiksi la minimuman nombron de membroj varbotaj jare laŭ la nombro de la loĝantoj en la urbo. S-ro G. Warnier respondas, ke ankaŭ tio estus arbitra, ĉar oni devas konsideri ke la varbo de membroj multe dependas de la stato de la esperanta movado, kiu estas tre variebla.

La deziresprimo pri Raporto 4 estas malakceptita (nur tri personoj voĉdonis por ĝi).

La deziresprimo pri Raporto 5 estas unuanime akceptita kaj speciale aprobita.

La deziresprimo pri Raporto 6 estas subtenita de S-ro G. Chavet (Del. Paris) sed li proponis, ke la societoj de specialistoj ĉiam havu la rajton aliĝi al U. E. A.

La jena deziresprimo :

« *La Kongreso de U. E. A. en Washington, aŭdinte la raporton de S-ro Th. Kempe, esprimas la deziron, ke oni akceptu kiel « Esperantiajn Entreprenojn » nur industriajn entreprenojn, firmojn, hotelojn, neesperantajn societojn, kaj esperantajn societojn de specialistoj, sed estonte ne plu akceptu esperantistajn propagandajn societojn kiel « Esperantiajn entreprenojn ».*

estas unuanime akceptita.

La deziresprimo pri Raporto 7 estas unuanime akceptita.

La deziresprimo pri Raporto 8 estas unuanime akceptita.

Pri la Raporto 9, S-ro Warden (Edinburg) proponas ke oni malakceptu la deziresprimon. Li diras, ke oni jam alkutimiĝis al la vortoj *Delegito* kaj *Konsulo* kaj opinias ke « Delegito » estas tute taŭga vorto por nomi personon, kiu rekte reprezentas la Asocion.

S-ro G. Chavet subtenas la proponon de S-ro Warden, kaj insistas por ke oni forĵetu tute la vorton « Konsulo » kiu en multaj landoj estas ridinda, kiam ĝi aplikiĝas al Esperantisto.

D-ro L. L. Zamenhof forte aprobas la proponon de S-ro Chavet forĵeti la vorton « Konsulo ».

La deziresprimo pri Raporto 9 estas unuanime malakceptita, kaj la Kongreso varme rekomendas al la Komitato elekti vorton pli taŭgan ol « Konsulo » por nomi la helpantojn de la Delegito.

La deziresprimo 10 (pri Esperanto Oficejoj) estas unuanime akceptita.

Pri la propono de reformo de l'kalendaro S-ro Warden, kiu dum kelkaj jaroj studis la demandon, opinias, ke la demando estas tre interesa sed ke oni ne povas aprobi de nun definitivan sistemon.

S-ro Warnier ankaŭ subtenas la proponon, kaj S-ro Chavet rimarkigas, ke oni devas nur aprobi principe la proponon.

D-ro L. Zamenhof diras ke la demando estas plej interesa kaj proponas, ke oni resendu ĝin al la Komitato de U. E. A. por atenta esplorado kaj preparo de raporto al la venonta Kongreso de U. E. A.

Anstataŭ la deziresprimo de S-ro Rousseau, la Kongreso de U. E. A. en Washington proponas la jenan kiu estas unuanime akceptita :

« *La Kongreso principe akceptas la proponon de S-ro Th. Rousseau pri reformo de l'Kalendaro kaj varme subtenas ĝin. Ĝi petas la Komitaton de U. E. A. funde studi la demandon kun la helpo de kompetentaj personoj kaj prezenti detalan raporton pri la afero al la venonta Kongreso de la Asocio.*

La deziresprimo pri Raporto 11 estas unuanime akceptita.

La deziresprimo pri Raporto 12 estas unuanime akceptita.

La Kongreso ne ricevis la tekston de la Raporto 13 kaj sekve ne diskutis ĝin.

La deziresprimo pri Raporto 14 estas unuanime akceptita.

La Kongreso dankas S-ron Vogler pri liaj interesaj raportoj 15 kaj 16.

La deziresprimo pri Raporto 17 estas unuanime akceptita.

La deziresprimo pri Raporto 18 estas unuanime akceptita.

La Kongreso ne ricevis la tekston de la Raportoj 19, 23 kaj 25 kaj sekve ne diskutis ilin.

La deziresprimo pri Raportoj 20, 21, 22, 24 kaj 26 estas unuanime akceptitaj.

La Sekretario :
G. Warnier.

Universala Ligo

1-an internacia konferenco
19-an de Aŭgusto 1910 (*Washington*).

Deklaracio.

1° « Universala Ligo » estas tutmonda organizacio, celanta popularigi ideon pri la tutmonda unuigo de regnoj.

2° « U. L. » dividiĝas je aŭtonomaj partoj laŭ la diversaj regnoj.

3° Por solidara kaj konsenta agado de la tuta « U. L. » oni organizas ĉiujare konferencojn el diversregnaj reprezentantoj, kiuj ellaboras ĉiuspecajn regulojn, instrukciojn, deklaraciojn kaj « Normalan Regularon », kaj difinas la lokon por « Centra Oficejo » de la tuta « U. L. ».

4° Por la internaciaj konferencoj, por internaciaj rilatoj kaj por ĝeneralaj dokumentoj de la « U. L. » oni akceptas la lingvon Esperanto kiel oficialan. Por la internaj aferoj oni uzas la lingvon nacian aŭ laŭvole.

5° Ĉiu parto de la « U. L. » gardante la esencon de la « Normala Regularo » povas ŝanĝi ĝiajn detalojn laŭ la postuloj kaj bezonoj de sia Regno : almenaŭ 2 ekzempleroj de la jam definitive konfirmita

loka regularo (nepre kun esperanta traduko) devas esti sendata al « Centra Oficejo » de la « U. L. ».

Rezolucioj.

1° Oni rekomendas, kiel « Normalan Regularon » por ĉiuj partoj de la « Universala Ligo », la unuan regularon de la « U. L. », permesitan de la rusa registaro la 27 — an de Aprilo 1910.

2° « Centra Oficejo » de la « U. L. » devas esti en Peterburgo ĉe la Centra Komitato de la rusa parto de la « U. L. » Adreso: « Universala Ligo », St. Peterburgo, Rusujo.

3° « Centra Oficejo » laŭ konsiloj de la internaciaj konferencoj organizas ĉiujare konkursojn kun premioj por plej bonaj verkoj, konformaj al la celoj de la « U. L. ».

4° La sekvanta internacia koferenco de la « U. L. » devas esti en Belgujo en la urbo Antverpeno samtempe kun la sepa internacia kongreso de Esperanto.

5° Estas dezirinde ke la « Centra Oficejo » organizu ĝis la sekvanta internacia konferenco la konkurson kun la premioj por jenaj temoj:

a. « Kial estas necesa la tutmonda unuiĝo de regnoj? »

b. « Kiel oni povas ĉesigi la internaciajn militojn por ĉiam? »

Adreso: « Universala Ligo » Vvedenskaja 22, loĝ 9, St. Peterburgo, Ruslando.

TABELO DE ENHAVO

Paĝoj

I. *Malferma parolo de Doktoro Zamenhof* 1

II. *Protokolo de la kunsido de la Lingva Komitato* 8

III. *Oficiala protokolaro de la ĝeneralaj kunsidoj* 16

Solena malferma kunsido 16
Dua kunsido 19
Tria kunsido 20
Solena ferma kunsido 23

IV. *Aldonoj al la protokolaro* 27

1. Raporto de S-ro Boirac prezidanto de la Lingva Komitato 27
2. Raporto de S-ro Generalo Sebert, je la nomo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj 33
3. Kongresa Decidaro 37
4. Statistiko pri la nombro de kongresanoj 40
5. Oficialaj akceptoj 41

V. *Nomaro de la Kongresanoj* 42

VI. *Kunvenoj de specialistoj* 52

Bankistoj 52
Fervojistoj 52
Inĝenieroj 52
Juristoj 53
Ĵurnalistoj 54
Liberpensuloj 56
Pacifistoj 56
Poŝtoficistoj 58
Scienca Asocio 59
Universala Esperanto-Asocio 67
Universala Ligo 71

46517 PARIS. — IMPRIMERIE GAUTHIER-VILLARS,
Quai des Grands-Augustins, 55.

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

Katalogo de la eldonaĵoj (*Daŭrigo*)

DIVERSAJ VERKOJ

Oficiala Protokolaro de la unua Kongreso	0 30
Detala raporto pri la unua Kongreso	1 30
Aymonier (C.). — Réponse à des critiques (en franca lingvo)	0 25
E. Boirac. — Le Congrès espérantiste de Genève (*id.*).	0 40
La Presse et les Congrès d'Esperanto (Kolekto de plej gravaj artikoloj de la ĵurnaloj francaj kaj anglaj, okaze de la tri unuaj Kongresoj de Esperanto).	
Unua Kongreso (*elvendita*).	
Dua Kongreso (en franca lingvo)	0 25
Tria Kongreso (en angla lingvo)	0 75
Baronino de Menil. — La morala edukado de la popola infano (en Esp. kaj franca lingvoj. kun multaj ilustraĵoj)	1 »
Poŝkartoj pri la unua Kongreso. La aro da 12 diversaj.	0 30
L'Esperanto et les Institutions publiques (kolekto de diversaj oficialaj dokumentoj pri Esperanto, en franca lingvo)	1 25
Bibliographie de l'Esperanto et Classification décimale universelle (en franca lingvo)	0 50
Generale Sebert. — I. Esperanto et les langues nationales (en franca lingvo).	0 50
— La langue internationale auxiliaire Esperanto. (en franca lingvo)	0 25
— Pri modela Klasifiko de Esperantaj Bibliotekoj.	0 50

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

ORGANO DE LA LINGVA KOMITATO

DE LA

KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ

KAJ DE LA

INTERNACIA KONSILANTARO

Redakcio kaj administracio

51, rue de Clichy, Paris.

Jara abono : 5 frankoj. — Unu numero : 50 centimoj.

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

ORGANO DE LA LINGVA KOMITATO
DE LA KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ
KAJ DE LA INTERNACIA KONSILANTARO.

JARA ABONO : 5 frankoj. — UNU NUMERO : 50 centimoj.

Redakcio kaj Administracio : **51, rue de Clichy, Paris.**

PROGRAMO DE LA GAZETO

Komunikoj de Dro Zamenhof.

Oficiala Gazeto publikigas ĉiujn komunikojn al la Esperantistaro senditajn de Dro Zamenhof.

Oficialaj Institucioj.

Lingva Komitato. *Oficiala Gazeto* publikigas ĉiujn sciigojn kaj dokumentojn pri la laboroj de la Lingva Komitato kaj de la Esperantista Akademio, la regularojn alprenitajn, la cirkulerojn de la prezidanto, la nomojn de la novaj anoj kaj de la anoj de la diversaj subkomitatoj, kun iliaj adresoj, la gramatikajn kaj vortarajn studojn verkitajn por la Lingva Komitato, k. t. p.

Ĝi plie publikigos, laŭ decido alprenita en Washington, respondojn de D° Zamenhof pri gramatikaj demandoj.

Konstanta Komitato de la Kongresoj. *Oficiala Gazeto* publikigas ĉiujn oficialajn informojn pri la organizo de niaj universalaj kongresoj, la protokolojn de la kunsidoj kaj ankaŭ de ĉiuj spe-

cialistaj kunsidoj, festoj, kunvenoj, okazintaj dum la Kongresoj, la raportojn pri la demandoj studitaj de la Komitato, k. t. p.

Internacia Konsilantaro. Estas publikigitaj sub tiu rubriko la nomoj kaj adresoj de la konsilantoj, la Regularo pri la laboro de la Konsilantaro. Oni publikigos ankaŭ ĉiujn dokumentojn kaj decidojn pri la laboro de tiu grava institucio.

Internaciaj Associoj.

Ĉiuj oficialaj dokumentoj, regularoj, gravaj decidoj, pri la grandaj internaciaj esperantistaj asocioj, Scienca Asocio, Universala Esperanto-Asocio, Asocio de Esperantistaj Juristoj, Tutmonda Kuracista Asocio k. t. p. estas metitaj sub tiu rubriko.

Ĝeneralaj Informoj

Tiuj informoj estas:

La Listo de ĉiuj novefondintoj esperantistaj grupoj kaj societoj;

Noto pri ŝanĝoj en la estraro aŭ adreso de tiuj societoj;

La listo de la novaj libroj kaj gazetoj aperintaj;

Fine ĉiuj informoj de ĝenerala intereso pri la progresado de Esperanto kaj ĝiaj sukcesoj.

EL LA DECIDARO DE LA SESA KONGRESO:

La Sesa Kongreso memorigas al ĉiuj societoj kaj grupoj, ke la abono al la Oficiala Gazeto estas unu el la plej bonaj rimedoj por helpi finance la oficialajn instituciojn de Esperanto, kaj por esti regule informata pri iliaj laboroj.

GRAVA AVIZO

La Esperantista Centra Oficejo, eldonanto de la Oficiala Gazeto, kaj sekretariejo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, memorigas al ĉiuj esperantistaj societoj, verkintoj kaj libreldonistoj, ke ĝi kolektas en sia biblioteko, ĉiujn dokumentojn (librojn, broŝurojn, prospektojn, afiŝojn, poŝtkartojn, gazetojn, en Esperanto aŭ pri Esperanto. Sekve, ĝi ricevos kun danko, ĉiujn sendojn.

ABONILO

Al *OFICIALA GAZETO*

Misendas la sumon de (1) ..... *frankoj,*

per (2) ..... *por abono al* Oficiala Gazeto

dum (3) ..... , *komencigonta la* (4) .....

.....

Oni sendu la abonon al la jena adreso (Skribu ĝin tre legeble).

.....

.....

.....

.....

.....

Subskribo :

Sendu tiun abonilon, kun la necesa mono, al

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

51, rue de Clichy, Paris.

---

(1) 5 frankoj por unu jaro (11 numeroj); 2,50 frankoj por ses monatoj.

(2) Poŝta mandato aŭ ĉekoj pageblaj en Pariza banko aŭ en Ĉekbanko esperantista.

(3) Unu jaro, ses monatoj....

(4) Montru la daton, je kiu komenciĝos la abono. La unua numero de *Oficiala Gazeto* aperis en Junio 1908. Restas kelkaj kolektoj de la unua jaro (N-roj 1-11) kaj de la dua jaro (N-roj 12-22) Ĉiu kostas 5 frankojn. La tria jaro komenciĝis kun la numero 23 en Junio 1910. Sed la abono povas komenciĝi je ĉiu aju dato.

46589 PARIS. — IMPRIMERIE GAUTHIER-VILLARS.
Quai des Grands-Augustins, 55.